

EL POPOLA ĈINIO

35-JARA JUBILEO DE "EL POPOLA ĈINIO"

中國報週


5 1985



中國報週

中國報週創刊廿五周年紀念
歲在甲子 惜舟長生堂





Fontakvo en monto Foto de ĜANG SUJAN

SUR LA KOVRILO:

Por tosto (Ĉinstila pentraĵo farita por la 35-jara jubileo de "El Popola Ĉinio") de DONG ĈENĜENG

Enhavo

Por la 35-jara jubileo de "El Popola Ĉinio"

Gratulaj vortoj	2
Por nia komuna afero	6
Gratulaj leteroj kaj artikoloj:	
<i>Tri memorindaj renkontiĝoj</i>	18
<i>La mondo atentis vin</i>	18
<i>Vivu "El Popola Ĉinio"</i>	19
<i>Ĝi apartenas al la internacia Esperanto-komunumo</i>	20
<i>Mi revenos al la urbo</i>	20
<i>Kiel mi konatiĝis kun Ĉinio?</i>	21
Gratulaj bildoj de ĉinaj pentristoj	13
Tibeto hieraŭ kaj hodiaŭ (5): Baji-urbeto, perlo sur la altebenaĵo	50
Malfermitaj urboj: Tjanĝin, la tria granda urbo de Ĉinio	36
Popola vivo:	
Ĉinaj gejunuloj kaj moderna vivmaniero	22
Vivo de maljunuloj	64
Scienco: Holografio en Ĉinio	29
Ĉina kuracisto: 28a-generacia ĉinmedicinisto He Ŝiŝji	26
Literaturo:	
Plej antikvaj odoj "Ĝiŭ Ge" surscenigitaj	56
Fanfaro de kamparanoj	42
Mikronovelo: Aŭtuna rememoro	41
Historiaj objektoj: Raraj elterigitaj antikvaĵoj	66
Vojaĝo tra Ĉinio: Ĉangŝa — granda urbo en centra Ĉinio.	31
Enciklopedieto de Ĉinio: Raraj animaloj de Ĉinio	48
Eksteraj rilatoj: Vizito al Horgos — komerca haveno ĉe la ĉina-sovetia landlimo	58
Kurantaj aferoj	45
Esperanto:	
Legu kaj lertiĝu	62
Pineto	47
Esp-novaĵoj	60

JARABONTARIFO		Francio	FF	60.00	Japanio	Yen	2 000.00	Usono	US\$	10.00	
Aŭstralio	\$A	9.00	FR Germanio	DM	18.00	Jugoslavio	Din.	300.00	Kanado	Can\$	10.00
Britio	£	5.00	Hispanio	Pts	900.00	Nederlando	Gld.	22.00			
			Italio	Lit	11 000.00	Portugalia	Esc.	700.00			
Por aliaj landoj en Eŭropo:	£	5.00	US\$	8.00	Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko:	£	2.80	US\$	4.00		

35-JARA JUBILEO DE EPĈ

VORTOJ SKRIBITAJ DE HUCZ, VICPREZIDANTO DE LA KONSTANTA KOMITATO DE LA ĈINA POPOLA KONGRESO KAJ PREZIDANTO DE LA ĈINA ESPERANTO-LIGO

第 四 页

中国自从有世界语的刊物,已经有七十多年了。但是那些刊物都没有出得很久,就停刊了。而且那些刊物主要是谈世界语的语言文字,而不是介绍人民中国一解放后的中国,唯有中国报道杂志是以报道人民中国为主的,而且出报已经有三十二年了。~~所以~~它报道了解放后的中国,《人民时评》中国,所以行销到全世界几十个国家,甚至还有还是终身定户,这证明了用世界语作为国际辅助语,进行两国人民的友谊和生活,是没有一种语言可与之比的。

现在是信息社会开始的时候,世界语是信息社会的管理理想的工具。我们相信中国报道创刊二十周年,就是二十一世纪的开始,世界语在传达信息将起更大的作用,人民的幸福,世界的和平,将成为现实。你从一个希望者(optimist)是这样希望着的,中国人民也是这样希望着的。

胡克

2010



Jam pasis pli ol 70 jaroj, en kiuj aperis ĉinaj Esperantaj revuoj. Sed ili ĉiuj ĉesis post ne-longa ekzisto. Cetere, ili temis ĉefe pri Esperanto, sed ne diskonigis la popolan Ĉinion, la liberigitan Ĉinion. Nur la revuo "El Popola Ĉinio" prenis kiel sian ĉefan taskon informadon pri la popola Ĉinio. Kaj ĝi jam travivis 35 jarojn. Dank' al sia informado pri la liberigita Ĉinio, la nova popola Ĉinio, EPĈ povas distribuiĝi en dekoj da landoj. En ĝia legantaro troviĝas eĉ dumvivaj abonantoj. Tio pruvis, ke Esperanto kiel internacia helpa lingvo estas la plej taŭga por amikiĝo kun diverslandaj popoloj kaj necesa por la homa vivo.

Nun jam komenciĝis la informa socio. Esperanto estas la plej ideala komunikilo en tiu socio. Mi estas certa, ke en la 50-jara jubileo, t.e. en la unuaj jaroj de la 21-a jarcento Esperanto ludos pli grandan rolon en transigo de informoj, kaj realiĝos feliĉo de la popoloj kaj paco de la mondo. Tion esperas mi, esperanto. Tion esperas ankaŭ la ĉina popolo.


GRATULAJ VORTOJ KAJ LETEROJ

GRATULO DE JAŬ JILIN, VIC-ĈEFMINISTRO DE LA ŜTATA KONSILANTARO
DE LA ĈINA POPOLA RESPUBLIKO

中国报道杂志社，
亲爱的同志们：

作为一个在互译前曾经参加过世界语运动的 世界语者，特对《中国报道》创刊二十五周年表示热烈的祝贺。希望你们的事业日益发扬光大。希望你们继续团结一致，向全世界世界语者实事求是地报道中国社会与建设的情况。希望你们同一切世界语者团结起来，为争取世界和平而奋斗。

姚锦林
一九五五年一月十日



Al la Redakcio de "El Popola Ĉinio"

Karaj gesamideanoj,

Kiel esperantisto partoprenanta Esperantan movadon antaŭ 50 jaroj, mi esprimas varman gratulon al vi okaze de la 35-a datreveno de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio". Mi deziras al via afero plian disvolviĝon kun ĉiu tago, kaj ke vi kiel antaŭe prezentu laŭfakte la ĉinan socialisman konstruadon al esperantistoj de la tuta mondo, ke vi unuiĝu kun ĉiuj esperantistoj kaj batalu por la monda paco.

Jaŭ Jilin

La 20-an de jan. 1985

VORTOJ SKRIBITAJ DE BAKIN, PREZIDANTO DE LA ĈINA VERKISTA ASOCIO
KAJ MEMBRO DE LA HONORA PATRONA KOMITATO DE UEA

“El Popola Ĉinio” estas bone eldonata. Estas gratulinde, ke ĝi kreskis pli kaj pli bone dum la 35 jaroj kaj ĝia influo fariĝis pli kaj pli granda. Mi tre ĝojas pri tio.

Bakin
La 14-an de feb. 1985



刊物办得不错，创刊三十五年，而且越办越好，
影响越来越大，值得庆祝，我也很高兴。

巴金 二月十四日

VORTOJ SKRIBITAJ DE LU ĜJASU

作为语言工具，世界语需要科学，作为学术交流工具，科学更
需要世界语。祝《中国报道》在应用世界语为中外科技文化交流服
务方面发挥更大、更多的作用！

卢嘉锡
一九八五年春节

VORTOJ SKRIBITAJ DE ĈU TUNAN, PREZIDANTO DE LA "AMIKOJ DE ESPERANTO"
 POR LA 35-JARA JUBILEO DE LA FONDIĜO DE "EL POPOLA ĈINIO"



Diskonigu la novan Ĉinion en ĉiuj ĝiaj aspektoj, pliigu la interkomprenon kaj amikecon inter la ĉina kaj aliaj popoloj de la mondo, kaj faru novan kontribuon en propagando kaj disvastigo de la Esperanto-movado kaj defendo de la mondpaco kaj progressa afero de la homaro.

介紹新中國各方面情況增進中
 國人民同世界各國人民的相互
 了解和友誼並為宣傳和推廣世
 界語運動維護世界和平人類
 進步事業作出新的貢獻
 中國報道創刊
 卅五周年紀念
 楚圖南

PREZIDANTO DE LA ĈINA AKADEMIO DE SCIENCJOJ

Kiel lingva komunikilo, Esperanto bezonas sciencon kaj scienco des pli Esperanton kiel akademian komunikilon. Mi esperas, ke "El Popola Ĉinio" ludos pli grandan rolon en pli multaj kampoj en aplikado de Esperanto al interŝanĝo de scienco, tekniko kaj kulturo inter Ĉinio kaj aliaj landoj.

Lu Ĝjaŝji
 En la Printempa Festo de 1985



POR NIA KOMUNA AFERO

— Pri kunsido de laborantoj de EPC por ĝia 35-jara jubileo

LA kuranta majo estas la 35-a datreveno de nia gazeto. Okaze de tio, kunsidis laborantoj kaj emeritoj de nia redakcio. Ili retrorigardis ĝian iritan vojon kaj fieris, ke ili povis iom kontribui al ĝi. Ili estas plenaj de fido al la estonteco de la gazeto. Jen raporto pri la kunsido.

Ŝju Ŝanŝu (vicestro de la redakcio, konsilanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Esperanto-Ligo kaj ĉefredaktoro de "La Mondo"): Hodiaŭ ni kunsidas ĉi tie. Mi pensas, ke vi ĉiuj tre ĝojas kiel mi, ĉar ni festas la naskiĝtagon de nia Esperanta gazeto kaj tiu tago venas en kuraĝiga situacio. Dum la pasintaj 35 jaroj al la internacia Esperanto-movado okazis granda ŝanĝo kaj ankaŭ la ĉina movado rapide disvolviĝis post sia stagnado. Nun en Ĉinio jam centmiloj da homoj lernas nian lingvon kaj tio puŝas la ĉinan Esperanto-movadon al nova etapo. Nun la gazeto "El Popola Ĉinio" estas en sia prospereco, kio estas nedisigebla de la diligenta laborado de la redakcia personaro kaj subtenado de la legantoj. Hodiaŭ ni kune celebras ĝian naskiĝtagon kaj resumas nian laboron, tio certe utilos al la plua disvolviĝo de nia gazeto.

EN LA UNUAJ JAROJ POST LA FONDIĜO

Honfan (emerita konsilanto de la redakcio): Mi tre ekscitiĝis, kiam mi informiĝis pri la aranĝo de tiu ĉi kunsido. Hieraŭ

vespere mi denove foliumis la konservatan inaŭguran numeron de EPC. Ĝi estas nur oktava okpaĝa bulteno el malbonkvalita papero, tute nekomparebla kun la hodiaŭa bela gazeto.

"El Popola Ĉinio" estis iniciata de famaj veteranaj esperantistoj Hujucz kaj Ĵelezo, prezidanto kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, en majo 1950. Aprile de la sama jaro mi venis al Pekino por la fondo de la gazeto. En la unuaj jaroj post ĝia fondiĝo en la redakcio laboris nur Venlo Fon, Li Ŝiĝjun kaj mi. Nin gvidis Ĝang Ĉjiĉeng, nuna ĝenerala sekretario de ĈEL. Pro manko de laborantoj ni devis plenumi redaktadon, paĝo-aranĝon kaj distribuadon, tamen ni estis fervoraj kaj energiplenaj, ĉar ni okupiĝis pri la unua Esperanta gazeto eldonata de la nova Ĉinio.

En la unua numero ni raportis pri multaj temoj, kiel liberiĝo de la ĉina popolo, deklaracio pri la mondpaco, transformiĝo de almuzo en ŝtatoficiston, ktp. Tuj post kiam la periodaĵo atingis niajn samideanojn, ĝi jam ricevis eĥojn. Ĉiuj ĝiaj artikoloj, escepte de nur unu, estis reaperigitaj en gazetoj de aliaj landoj, i.a., unu el ili estis samtempe republikigita de tri landoj.

Ne estis facile, ke siatempe ekzempleroj de EPC estis venditaĵoj unu post alia kaj abonantoj varbitaj unu post alia de niaj eksterlandaj samideanoj. Oni povas

diri, ke sen tiuj entuziasmaj perantoj kaj legantoj ne ekzistus la hodiaŭa "El Popola Ĉinio".

Li Ŝiĝjun (vicĉefredaktoro de la redakcio, membro de la Akademio de Esperanto kaj konsilanto de la Konstanta Komitato de ĈEL): "El Popola Ĉinio" naskiĝis en la sama monato de la sama jaro kiel mia unua infano. Tiu-jare mi kun mia tri-monata bebo venis el la malproksima urbo Ĉengdu al la redakcio de EPC en Pekino. 35 jaroj pasis rapide kiel sago. Mi propraokule vidis nian gazeton kreski kaj mi tre ĝojas pri tio. En tiuj 35 jaroj nia lando iris zigzagan vojon kaj tiel same ankaŭ nia gazeto. La sorto de la gazeto firme ligiĝis kun tiu de la lando. Influate de la internacia situacio nia gazeto ĉesis aperi inter 1954 kaj 1957, tamen poste ĝi restariĝis kaj daŭre aperadas ĝis hodiaŭ. Tio ĉi ja estas afero priĝojinda.

Ljaŭ Ĝigen (membro de la traduka sekcio): "El Popola Ĉinio" povas daŭre ekzisti dank' al venko super malfaciloj. En 1952 mi eklaboris en nia redakcio. Mi okupiĝis pri fotoj kaj paĝo-aranĝo. Tiam ni ne havis specialan fotiston, nek fotoaparaton. La necesajn fotojn ni devis peti de aliaj redakcioj. Kiam ni restariĝis la gazeton en 1957, ni faris koloran kovrilon por ĝi, sed tenis la ilustraĵojn nigraj-blankaj. Ni devis importi paperon por kovrilo. Nia unua fotoaparato estis

aĉetita en la komenco de la sesdekaj jaroj. Tiam ni presis tre malmultajn bildojn en la gazeto por publikigi pli da artikoloj, kaj la tipografio ne estis plaĉa. Nun ni jam havas specialajn fotistojn kaj projektistojn kun modernaj fotoaparatoj. Multe pliboniĝis niaj kondiĉoj.

PLI KAJ PLI DA TRADUKISTOJ

Li Ŝiĝjun: La pliboniĝon de la kondiĉoj montras ankaŭ la kreskanta personaro. En 1957, kiam refunkciis la gazeto, troviĝis nur ses-sep personoj, kiuj devis fari intervjuojn kaj verki artikolojn. Estis tre streĉa la laboro. En 1965 ni akceptis novajn laborantojn pro aldono de paĝoj, peziĝo de taskoj kaj manko de labormanoj. El la novuloj iuj bone posedis Esperanton, aliaj estis komencantoj kaj triaj ne sciis nian lingvon. Laŭ malsamaj kondiĉoj kaj laŭ bezono de laboro ni faris labor-dividon, nome ni starigis sekciojn tradukan, redaktan, fotografan kaj korespondan. Nun la traduka sekcio ne nur verkas iom da artikoloj, sed ĉefe esperantigas tiujn faritajn de la redakta sekcio.

Ŝju Ŝanŝu: Laŭ longperioda vidpunkto ni devas ŝanĝi tian situacion kaj krei kondiĉojn por iom post iom efektiviĝi la celon, ke la tradukistoj okupiĝu ankaŭ pri redaktado.

Zoŭ Gŭoŝjang (estro de la traduka sekcio kaj vicrektoro de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto): Ĉe la fondiĝo nia sekcio havis nur 4-5 personojn kaj nun 12. Kvankam kun malegala lingvo-nivelo, ili estas tre fervoraj por Esperanto. El ili iuj estas memfaritaj esperantistoj, aliaj iam studis alian lingvon en altlernejoj kaj poste interesiĝis pri Esperanto



Estraro de la redakcio (de maldekstre): Li Ŝiĝjun, Jang Ŝumo, Ŝju Ŝanŝu kaj Ŭang Ĝjiĉuo.

kaj triaj estas bakitaj de nia Esperanto-kurso.

Ŝju Senĵong (vicestro de la traduka sekcio): Mi longe entreprenis tradukadon de Esperantaj libroj kaj antaŭ unu jaro komencis okupiĝi pri la gazeto. En la sekcio s-ro Ljaŭ Ĝigen estas la unua veninto kaj ankaŭ la plej aĝa. Li havas pli ol 50 jarojn kaj multaj aliaj ĉirkaŭ 40 jarojn. Ili faris sian kontribuon al Esperanto.

Niaj legantoj ofte skribas al ni por laŭdi nian laboron kaj nian lingvan nivelon. Ni dankas ilin. Ni rigardas ilian laŭdon kiel kuragiĝon por ni, ĉar ni konscias, ke ni havas ankoraŭ multajn mankojn en nia laboro. Ni pensas, ke estas kreiva laboro redakti kaj eldoni tiun ĉioampleksan gazeton. Ni devas havi ne nur certan Esperantan nivelon, sed ankaŭ diversajn sciojn. Verdire, en la du flankoj ni ankoraŭ ne

estas tiel perfektaj, kiel la laboro postulas de ni. Iam venis al ni malfacile tradukeblaj artikoloj pri la ĉina medicino kaj la filozofio de la antikva Ĉinio. Por trovi ĝustan esprimon aŭ terminon ni devis konsulti multajn ĉinlingvajn, Esperantajn aŭ alilingvajn materialojn. Iuj legantoj plendis, ke ni uzis multajn malfacile kompreneblajn vortojn en niaj sciencaj artikoloj. Ili trafe kritikis nin. De nun ni devas lerni pli da scioj, laŭeble altigi la kvaliton de niaj tradukoj kaj fari necesajn klarigojn.

Li Ŝiĝjun: Ni vidas ankaŭ, ke iuj el niaj tradukaĵoj estas krudaj, pezaj kaj vorto-post-vortaj. Ni devas strebi al alta stilo de literatura lingvo. Esperanto originas en Eŭropo. Al ni orientanoj ĝi ŝajnas portanta karakterizaĵojn de okcidentaj lingvoj. Ĝi estas internacia lingvo, tial ĝi ne devas

tro dependi de la Okcidento. La orientaj esperantistoj devas sorbigi la kvintesencon de orientaj lingvoj al Esperanto. Tio postulas, ke ni uzantoj de la lingvo senĉese faru esploradon kaj strebu por havigi al ĝi novan sangon kaj ankoraŭ pli grandan vivipovon.

ĜOJO POST MALFACILOJ

Ŝju Ŝanŝu: Por ke "El Popola Ĉinio" fariĝu enhavoriĉa gazeto dezirata de la legantoj, niaj redaktoroj kaj raportistoj kolektas diversflankajn materialojn kaj vojaĝas aliloken por intervjui, foti kaj verki. Ili laboras, oni povas diri, en la fronto de nia gazeto.

Lu Ĉuanbjaŭ (vicestro de la redakta sekcio): El la artikoloj kaj fotoj publikigitaj en nia gazeto plejparto estis farita de niaj raportistoj, nur malgranda parto estis farita de enlandaj fakuloj kaj specialistoj laŭpete. En la lastaj jaroj ni kreskigis la nombron de raportistoj kaj fotistoj. Nun ni jam havas 12 raportistojn kaj ses fotistojn. Tio estas multe diferenca de la unuaj jaroj post la fondiĝo de nia gazeto.

Temoj de nia gazeto estas tre diversaj, tial ĉiu raportisto prizorgas unu aŭ du el ili. Tia labordivido ne estas rigora. Se necese, oni povas libere disponi pri raportistoj. Ĝenerale, ĉi tiuj intervjuas unuope. Por raportoj pri granda temo, oni organizas provizoran grupon. Ekzemple, la artikolo-serio "Ĉongĉing Provanta Ekonomian Reformon" publikigita en la unua numero de 1985 estis plenumita kune de du raportistoj kaj unu fotisto. Ili havis mallongan tempon por pretigi la artikolojn kaj fotojn. Dum sia restado en Ĉongĉing ili intervjuis tage kaj verkis vespere. Ili sendis

unu post alia siajn artikolojn al la redakcio en Pekino kaj ĉi tiu traktis iliajn artikolojn en postlaboraj horoj. Kaj fine en la jarkomenco de 1985 la artikolo-serio prezentiĝis al niaj legantoj.

Ĝang Ĉingĝen (raportistino): Ni vojaĝas aliloken du aŭ tri fojojn en jaro. Kaj ĉiu vojaĝo daŭras ĉirkaŭ unu monaton, iafoje eĉ pli longe. Pasintjare s-ino Ĝang Mejĝi vojaĝis pli ol mil kilometrojn en Ŝenŝji, Ŝanŝji kaj la Interna Mongolio, preskaŭ du monatojn, por la artikolo-serio "Sude kaj Norde de la Granda Muro". Reveninte ŝi diris, ke iuj lokoj estas neatingelbaj per aŭto kaj ili devis piediri. Foje ili devis surgrimpi gruzan monton por rigardi ruinon de la Granda Muro. Ŝi glitfaladis kaj poste estis suprentirita de la akompananto, kiu kaptis firme ŝiajn manojn.

Ŝju Ŝanŝu: Raportistoj ofte transiras montojn kaj riverojn. Tio tre lacigas ilin, precipe virinojn. Kaj vi raportistinoj agu laŭ via eblo.

Ĝang Ĉingĝen: Faktoj montras, ke ni virinoj estas same fortaj, kiel la viroj (ridado de la ĉeestantoj). Nia sekcio havas tri raportistinojn: mi, Ĝang Mejĝi kaj Ŝaŭ Bin. Ŝaŭ hodiaŭ forestas pro malsano. Ŝi estis unu el la raportintoj pri la Granda Muro. Ŝi atingis Ĝjajugŭan-pasejon en Gansu-provinco, la okcidentan finon de la Granda Muro. Ŝi diris al ni, ke tie la trafiko estas maloportuna kaj la vivkondiĉoj malbonaj kaj ŝi vidis la dezertan lokon kvazaŭ alian mondon en alia epoko.

Tion mi ne spertis, ĉar mi raportas la socian vivon kaj pasigas tempon ofte en la hejmo de miaj intervjuatoj. Sed ankaŭ min ĉag-



Veterana esperantisto Honfan

renas io kaj alio. Kiel konate, post la laborado ĉinaj oficistoj kaj laboristoj devas fari pezan dommas-trumadon kaj ne havas tempon babili kun neinvitita gasto. Sekve mia intervjuo iafoje iris neglate. Sed mi trovis, ke se vi senĉese klopodas kaj eĉ ĝustatempe helpas la intervjuaton fari iom da hejmlaboroj, via sincereco povas lin kortuŝi. Rememorante, ke mi aŭskultis lian korverŝan parolon kaj pretigis artikolon por niaj legantoj, mi sentas mian laboron signifplena. Eble tio estas nia ĝojo.

Laŭ Baj (fotisto): Ŝajnas al mi, ke la plej grava tasko por fotisto estas laŭeble konigi al la legantoj la veran fizionomion de Ĉinio. Foje en letero de iu leganto mi legis, ke nia foto montras ridantan maŝiniston en laborado. Tio signifas, ke antaŭe ni ne nur raportis pli da sukcesoj kaj malpli da malfaciloj, sed eĉ publikigis iujn fotojn ne naturajn kaj ne seriozajn. Post la rimarkigo de la leganto ni komencis forigi nian mankon. En 1982 mi kaj mia kolego Caj Hajfeng oficvojaĝis al Ŝingĝjang. Iutage ni intencis foti tapiŝan bazaron, sed rimarkis kelkajn malbone vestitajn homojn sur la fono. Ĉu decas ekskluzivi

ilin? Fine ni fotis ilin, ĉar tia fono povas pli fidele speguli la lokan vivon. Nun ni devas lerni el nia pasinta leciono kaj akcepti la kritikon de niaj legantoj por fari pli dezirindajn fotojn.

KRITIKO KAJ PROPONO ESTAS MOVFORTO

Ŝju Ŝanŝu: Niaj legantoj jam skribis al ni, ke lastatempe niaj numeroj montris ne ĉiam ridajn vizaĝojn. Niaj legantoj estas malkaŝemaj. Ili kritikas niajn malbonojn kaj laŭdas niajn bonojn. Sendube, ni bezonas des pli iliajn superrigardon, kritikon kaj proponon. Iliaj kritiko kaj propono estas movforto por plibonigi nian gazeton.

Ŭang Ĝjiĉuo (sekretario de la redakcio): Jes, prave. Kelkaj raportistoj jam diris, ke dum plenumo de sia tasko ili renkontis multajn malfacilojn. Antaŭ kvin jaroj ni eldonis tiun saman gazeton, sed nia diligenta laboro ne rikoltis atenditan efikon. Nemalmultaj legantoj kritikis nin, ke ni publikigis artikolojn multe pri politiko kaj ne pri ĉinaj Esperantaj novaĵoj, mankas vario al la temoj kaj oni ne konigis vidpunktojn de la ĉina popolo pri internaciaj problemoj, kaj tiel plu. Nia redakcio akceptis iliajn kritikojn kaj proponojn. Ĝi variigis la enhavon de la gazeto kaj komencis informi ne nur pri Esperantomovado en Ĉinio, sed ankaŭ pri tiu en aliaj landoj. Nia revuo faris ne nur ĝeneralan raporton pri Ĉinio, sed ankaŭ raporton pri specialaj temoj pri ĝi. Precipe en la lastaj jaroj ni publikigis serion da artikoloj pri unu sama temo en sinsekvaj numeroj, kiel "Vojaĝo tra la Meza Baseno de la Flava Rivero", "Sude kaj Norde de la Granda Muro", ktp. Krome ni ankaŭ neregule aperigis artikolojn



Redaktoroj

lojn pri internaciaj problemoj interesantaj niajn legantojn. Kaj tiel nia gazeto fariĝis iom pli enhavoriĉa. Iuj legantoj diris en siaj leteroj, ke tio estas bonvena al ili. Jam efikis la laboro de nia personaro. Mi klare vidas, ke

gazeto ne havas vivipovecon, se ĝi ne konsideras siajn legantojn kaj ne plenumas iliajn dezirojn. Tiurilate nia koresponda sekcio faris multajn laborojn por kontakti kun niaj legantoj kaj peti iliajn opiniojn.

Ivan Ko (estro de la koresponda sekcio): Nia laboro komprenigi al ni, ke interkomunikado de pensoj inter la redakcio kaj la legantoj estas grava faktoro por plibonigi la gazeton. Ni faras tian interkomunikadon per la gazeto kaj ankaŭ per nia korespondo kun legantoj. Iuj figure nomas nian korespondan laboron ponto inter la legantoj kaj la redaktoroj. Nia tasko estas korespondi kun en- kaj eksterlandaj legantoj, respondi iliajn demandojn kaj transdoni iliajn opiniojn al la redaktoroj. En nia sekcio laboras tri viroj kaj unu virino. Kun peza laboro nia malgranda sekcio volonte kontribuas al plifortikigo de tiu ponto.

Hoŭ Ĝiping (vicestro de la koresponda sekcio kaj vicrektoro de la Ĉina Koresponda Esperanto-Instituto): Nia koresponda laboro iras ĉiam kun varma subtenado de niaj legantoj.

Hodiaŭ nia gazeto jam havas grandan legantaron, sed niaj pe-

rantoj kaj niaj legantoj, kiel antaŭe, senlace klopodas varbi por ĝi abonantojn. Pro tio ni kore dankas ilin.

En la lastaj jaroj niaj legantoj faris al nia gazeto multajn kritikojn kaj proponojn, kiujn ni alte taksis kaj transdonis al la koncernatoj. Iliaj kritikoj kaj proponoj estis aŭ estos akceptitaj.

Jang Gejŝoŭ (estro de la fotografa sekcio): Proponoj de legantoj multe helpis ankaŭ nian sekcion. Antaŭe la numer-cifero sidis ĉe la supra-maldekstra angulo kaj poste ni translokis ĝin al la supra-dekstra angulo por faciligi serĉon en jarkolekto. Tian ŝanĝon iu leganto proponis al ni. Ni transiris de reliefa presado al la intajla por pli klarigi la bildojn. Ankaŭ tion proponis niaj legantoj.

Jen Ŝijin (vicestro de la fotografa sekcio): Ni starigis laŭ la deziro de legantoj la rubrikon

"Fotoj Faritaj de Esperantistoj" por aperigi fotojn de iuj amatoroj. Tio estas subtenata kaj laŭdata de niaj multaj legantoj.

Lu Ĉuanbjaŭ: Estas des pli multaj la artikoloj kaj rubrikoj verkitaj kaj starigitaj laŭ la peto de niaj legantoj. Ni prenu kiel ekzemplojn la artikolojn "Pri Ĉin-medicina Kuracado", "La Ĉina Antikva Filozofio" kaj "Amo Akompanas Ilin" kaj la rubrikojn "5000 Jaroj de Ĉinio", "Mia Vivo" kaj "Vidindaj Lokoj". La proponoj de legantoj larĝigis nian vidkampon, helpis nin plivastigi la amplekson de raportado kaj riĉigis la enhavon de la gazeto.

Ni Dongjang (membro de la koresponda sekcio): Por montri sian profundan amikecon al ni, nemalmultaj samideanoj en festo sendis al ni donacetojn, kiujn ni konservas en granda kesto. La malgrandaj donacoj, kiel ĉina proverbo diras, montras tamen profundan senton.



Laborantoj de la fotografa sekcio

Ivan Ko: Por danki la fervorajn legantojn, ni ofte pensas servi al ili per io. Sed nia malgranda sekcio ne povas fari grandajn promesojn. Tio, kion ni povas, estas nur bagateloj. Ekzemple, inter niaj legantoj troviĝas multaj filatelistoj, kiuj ofte petas, ke ni afranku respondajn leterojn per ĉinaj memoraj poŝtmarkoj. Ni laŭeble plenumas ilian deziron, se ni havas tempon. Post kiam ni raportis pri la Dua Fabriko de Ĉinmedicinaj Medikamentoj de Hangzhou (Vd. la artikolon "Espero por Rejniĝo" en la kvara numero de 1983), nemalmultaj skribis al ni leterojn, ke ni aĉetu por ili medikamentojn. Ni plenumis la peton de iuj kaj, pro nia okupiteco, ni transdonis tiun de la aliaj al koncernaj organizoj. Nia neplenumo maltrankviligis nin. Ni sincere petas ilian pardonon.

Li Ŝiĝjun: Korespondo ebligis al ni havi konstantan kontakton kun multaj eksterlandaj esperantistoj kaj Esperantaj organizoj. Tia kontakto estas tre grava por pli bonaj interkompreno kaj kunlaboro inter ni kaj diverslandaj esperantistoj kaj iliaj organizoj. Nun nemalmultaj alilandaj Esperantaj organizoj informis nin pri sia aktivado, kaj ni akurate raportis tion en nia gazeto por akceli la disvolviĝon de nia movado. Antaŭ nelonge iu nova Esperanta organizo de Venezuelo sendis al ni leteron, kiu konigis al ni ĝian fondiĝon. Ni publikigis informon pri la organizo, kaj ĝi rigardis tion nia subteno al ĝi. Ni devas daŭre tiel fari.

PLENKORA SERVO AL LA LEGANTOJ

Jang Ĵumo (vicĉefredaktoro de la redakcio kaj konsilanto de la Ĉina Ĵurnalista Asocio): Prave

diris s-ro Li. Kiel nia lando, nia gazeto trairis zigzagan vojon. Estas konate, ke en la pasintaj 35 jaroj nia lando akiris grandajn sukcesojn neatingeblajn por ajna dinastio de Ĉinio kaj ankaŭ suferis grandajn perdojn. Post la dek-jara ĥaoso komencita en 1966 nia lando resumis pozitivajn kaj negativajn lecionojn kaj iris sur vojon de paco, solidareco kaj stabila disvolviĝo. Ankaŭ nia gazeto iam glate disvolviĝis, kun pli ol dekmilo da legantoj. Sed en la ĥaosa periodo ni ellaboris neĝustan redaktan politikon kaj faris erarojn en la laboro, tiel ke la nombro de abonantoj malleviĝis al miloj. Tio estis influita de la ĝenerala situacio de la lando kaj ne devis esti atribuita al tiu aŭ alia persono de nia redakcio. La jaro 1979 estis turnopunkto de nia gazeto. Kun subteno de eksterlandaj aŭtoroj kaj legantoj nia gazeto faris reformon kaj ekhavis aspekton kiel la nuna. Jes, ekde tiam nia gazeto iris denove sur la vojon de sana disvol-

viĝo. En la lastaj jaroj niaj legantoj konstante donis al ni kuraĝigajn vortojn: Agu laŭ tiu maniero. Nia nuna redakta politiko estas laŭdata de legantoj kaj tio inspiris nin kaj firmigis nian volon bone daŭrigi nian laboron.

Komprenoble, ni ankoraŭ havas multajn mankojn en la laboro. Ekzemple, ni redaktas la gazeton ne tute laŭ la gusto de niaj legantoj kaj niaj artikoloj kaj fotoj ankoraŭ ne povas kontentigi la bezonon de diversaj legantoj. Sekve, iuj kritikis, ke ni diras nur kion ni volas, kaj ne kion la legantoj deziras. Krome, ni ofte uzas neologismojn, kio malfaciligas al legantoj legi la gazeton. Ĉion ĉi ni devas ripari laŭ nia eblo.

Ĉar ni ne estas finance fortaj, ni ne povas apliki avangardan presarton. Ekde la unua numero de tiu ĉi jaro ni aplikas novan metodon de presado kaj la nigraj-blankaj fotoj montriĝas iom pli klaraj ol antaŭe, sed ĉiu eldona ciklo daŭras pli ol tri monatojn.

Laborantoj de la traduka sekcio



35-JARA JUBILEO DE "EL POPOLA ĈINIO"

Tiel nia informo pri kurantaj aferoj kaj niaj Esperantaj novaĵoj ne estas freŝdataj kaj ankaŭ iuj artikoloj perdas sian aktualecon. Ĝuste pro tio, kiam iuj legantoj proponas, ke ni prezentu vidpunktojn pri gravaj okazaĵoj en la mondo, ni timas, ke niaj legantoj ne interesiĝos pri nia "neĝustatempa komentario". Ankaŭ pro tio ni petas pardonon de niaj legantoj.

Okaze de la 35-jara jubileo de "El Popola Ĉinio", mi volus diri ankaŭ, ke same kiel homo, la 35-jara gazeto povas fariĝi iom pli saĝa kaj iom pli matura, retrorigardinte siajn iritan zigzagan vojon kaj erarojn en la juneco. La personaro de nia redakcio devas tuforte teni nian redaktan politikon aprobitan de la legantoj, aktive propagandi Esperanton, akceli la disvolviĝon de ĝia movado kaj samtempe pli vaste kaj pli profunde konigi al la legantoj la

pasintecon kaj nuntempon de Ĉinio. Ni devas havi la vidpunkton "la legantoj en la unua loko" kaj la maksimumon "ĉiam konsideri la legantojn kaj plenkore servi al ili" por senĉese plibonigi nian laboron.

Li Ŝiĝjun: Estas ne facile, ke nia gazeto kreskis ĝis hodiaŭ. Ekde sia unua numero ĝi estas eldonata en Esperanto. Tamen ĝi ne estas gazeto, kiu nur propagandas kaj disvastigas Esperanton. Ĝi dediĉas siajn multajn paĝojn al konigo de la politiko, ekonomio, historio kaj kulturo de Ĉinio, la vivo de ĝia popolo kaj la movado de ĝiaj esperantistoj. Tia gazeto fakte montras al la mondo, ke Esperanto vere estas internacia komunikilo kun praktika valoro. Ju pli da tiaj gazetoj oni eldonas, des pli da homoj oni povas servi per Esperanto. Bedaŭrinde, aperas malmultaj Esperantaj gazetoj. Ĝuste pro tio, ni

havas devon pli bone eldoni "El Popola Ĉinio", por ke pli da homoj legu ĝin kun plezuro kaj ĝi ludu ankoraŭ pli grandan rolon.

Caŭ Bajlong (raportisto): Por bone eldoni la gazeton, niaj raportistoj antaŭ ĉio devas fari profundan intervjuon kaj publikigi la akiritajn materialojn vivece kaj senerare. Aliflanke, estas necese plivastigi la amplekson de raportado. Efektive, nia raportado ne estas sufiĉe vastampleksa. Ni havas ankoraŭ multegon por konigi al la legantoj.

Ŝju Senĵong: Grava paŝo por altigi la kvaliton de la gazeto estas levi la lingvan nivelon. En nia traduka sekcio laboras ĝenerale 40-50-jaruloj. La tasko rapide kulturi junajn altnivelajn fakulojn devas iri en nian tagordon.

Ĵen Ŝijin: Ni intencas altigi la kvaliton de fotoj en du flankoj. Unu estas klopodi serĉi novajn aferojn en la vivo kaj novajn angulojn, kiuj povas speguli la popolan vivon, kaj la alia estas lerni novajn spertojn kaj teknikojn en kaj eksterlandajn. Ni jam prove aperigis foto-serion en sinsekvaj numeroj, sed nun ni ankoraŭ ne estas certaj pri la efiko.

Ŝju Ŝanŝu: Kolegoj, viaj vortoj montris vian profundan amon al nia gazeto, al Esperanto kaj al la legantoj. Tio estas ĝojiga, tio estas tre bona festado al la 35-jara jubileo de la Esperanta gazeto. Mi kredas, ke kun tia sento ni povos pli kaj pli bone eldoni nian gazeton.

Fine, okaze de la 35-a datreveno de "El Popola Ĉinio", ni kore dankas ĉiujn aŭtorojn, legantojn kaj perantojn.

(Redaktita de niaj raportistoj Ĉen Baŭhe kaj Ŝja Ĝingping laŭ protokolo)

Fotoj de LAO BAI

En la koresponda sekcio



GRATULAJ BILDOJ DE ĈINAJ PENTRISTOJ

35-jara jubileo de "El Popola Ĉinio"
Vortoj de MJAŬ ZI

中國
報
道
創
刊
卅
五
周
年

苗子誌



Birdoj kaj floroj

de ĈEN ĜIHONG

Ju pli multe, des pli
bone. de LI JAN



中國教養社廿五年紀念作
公孫之娘若神舞
吳昌碩




Dancanta virino Gongsun de JI JANG



Lotusfloroj kaj birdo de LU GUANGGAŬ

中國報通創刊卅五周年紀念
 乙丑年夏月
 光緒於日家筆



En granda gojo de A BAŬ

慶祝中國報通創刊
 喜氣洋洋
 乙丑年夏月

中國報通創刊卅五周年紀念
 乙丑年夏月



Umeffloroj kaj bambufolioj de GOŬ HŬAJMIN

梅竹永芳甲子冬
 中國報通創刊卅五周年紀念
 周協民



板
中國報
道
創
刊
三
十
五
週
年

恒
納
賞
也
一
九
三
五
年
初
春
聽
天
閣
之
感
不
第
一
寫
於
京
華
城
西
左
記

La luno en Sjisüangbanna de GU GJUNSAN

振興中華 放眼世界

中國振興會志創辦五周年紀念

Rigardi la mondon,
prosperigi Ĉinion

Vortoj
de GANG DING

Floroj de kame-
lio kaj umearbo
de SONG LU

一九八五年 發行致意



陽和春氣
不動搖齊
光恒必幽
蘭芳偏
含幽香吐
芳卷水之
下盤桓
草之旁
慶祝中國
振興會
創刊五周年
紀念
天年
未年
待年
待年

Bonodora orkideo inter
ŝtonoj de LI DECAI

Imagita bodisatvo de Dun-
hüang de GE ŠINMIN



春開子茶朵
香飄雲天外
中國報運來志社
創刊三十五周年
紀念 松塵致賀



敦煌印象 中國報運創刊三十五周年志賀 當世未幾

Tri memorindaj renkontiĝoj

de FLORA SZABO-FELSO* (Hungario)

La unua okazis en 1981. Februare mi kune kun mia edzo pasigis neforgeseblajn semajnojn en Ĉinio. Pri tio longe kaj afable raportis ankaŭ la revuo El Popola Ĉinio. Estis granda ĝojo rekte interparoli kun la kunlaborantoj de EPĈ, ekkonante tiujn homojn, kiuj verkas kaj redaktas la altnivelan monatan gazeton. Membroj de la redakcio akompanis nin en vizito de la Imperiestra Palaco. Ili konatigis al ni la valorojn de la riĉega ĉina kulturo kaj post la belega posttagmezo ni povis konstati: hodiaŭ ni ekkonis tre valorajn homojn.

En la 68-a Universala Kongreso en Budapeŝto partoprenis 13-membra ĉina delegitaro, inter

kies membroj troviĝis redakcianoj de El Popola Ĉinio. Post UK la delegitaro honorigis nin per vizito al nia urbo Pecs. Ankaŭ pri tio raportis EPĈ. La artikolo bone respegulis, ke la ĉina delegitaro estis tre bonvena en Hungarujo, kaj multaj hungaroj esprimis sian simpatian al la reprezentantoj de la ĉina popolo ĝojante, ke la kunlaboro inter la du landoj sur pluraj kampoj denove vigliĝis.

Fine mi skribu pri la tria renkontiĝo, kiu fakte okazis iom pli frue ol la due menciita. En la printempo de 1983 mi tute hazarde ekvidis ekzempleron de EPĈ en la montrofenestro de ordinara gazetvendista kiosko. Tio signifas, ke post preskaŭ



S-ino Flóra Szabó-Felső

dudekjara interrompo hungaraj esperantistoj pli grandnombre povas legi la altnivelan gazeton, kiu donas interesajn informojn pri la vasta lando Ĉinio, pri la internacia kaj la rapide progresanta ĉina Esperanto-movado.

* *La aŭtoro estas ĝenerala sekretario de UEA.*

La monda atentado vin

de BALDUR RAGNARSSON* (Islando)

Neniu plu nutras iluziojn pri la grandaj ŝanĝiĝoj, kiuj nuntempe okazas en Ĉinio. Okcidenta ideologio, okcidenta tekniko, fariĝis esencaj en la evoluo de la ĉina socio. Ĉu tio signifas, ke la grandioza, tradicia kulturo de Ĉinio jam elludis sian aktivan rolon en la kultura komplekso de la ĉina popolo? Ĉu venis jam la tempo kaj okazo rigardi kaj pritaksi tiun unikan tradicion kiel testamentaĵon liverotan al la mondo por admiro, ekzameno kaj primedito?

Respondoj al tiaj demandoj ne devas esti simplaj jesoĵoj aŭ neoj. La tradicioj havas la rimedojn konserviĝi en mil manieroj, en la lingvo, en la skribo, en la literaturo, arto, pensmaniero. Tamen, samtempe, oni konstatas, kiom futurorientita fariĝis la ĉina popolo en la moderna epoko. Mirinde rapidaj kaj radikaj estas la transformiĝoj, kiuj ondaras tra la ĉina socio. Sur la paĝoj de El Popola Ĉinio oni legas konstante atestojn pri tiuj transformiĝoj.



S-ro Baldur Ragnarsson

Oni ankaŭ subsentas la fortojn, kiuj levas kaj pluportas tiun nacivastan kreaĵon agadon al ĉiam novaj atingoj. Fortojn, kiuj havas siajn radikojn en la jarmilara kulturo de la plej granda popolo de la mondo. Fortojn, kiuj estas defiataj de perspektivoj plukrei kul-

Vivu "El Popola Ĉinio"

de W. AULD* (Britio)

Estimataj samideanoj,

Kiel konstanta leganto-abonanto de EPĈ ekde 1950 mi varme kaj tre danke salutas vin okaze de ties 35-jara festo. Ĉiam mi legis ĝin kun intereso, tamen ĝi estas hodiaŭ pli bela, interesa kaj valora, ol ĝi iam estis pli frue. Mi memoras, ke foje, kiam la politika linio de Ĉinio ne plaĉis al certa samideano, li diris emfaze, ke okcidentanoj devus "bojkoti" la revuon, ĉar ĝi estis "propagandilo de la ĉina registaro". Mi silentigis lin per demando: "Kiam, laŭ via opinio, via registaro montriĝos tiel sagaca kiel la

ĉinoj, kaj eldonos informojn en Esperanto?"

Vi vidis per la kunsendita foto, ke mia bindita kompleto de EPĈ estas fieraĵo de mia biblioteko. Mi antaŭĝojas pri la venontaj volumoj, legotaj kaj bindotaj, kiujn mi ricevu regule dum la cetero de mia vivo. EPĈ grave servas, ne nur al internacia amikeco, sed ankaŭ al la tuta esperantistaro. Ĝi vivu!

Kun festjaraj salutoj, via
W. Auld

P.S. Koran dankon pro la bela kaj senmanka eldonado de mia



S-ro W. Auld

ESPERANTA ANTOLOGIO!
Teknike la volumo estas tute fierinda!

** Fama poeto, eksprezidanto de la Akademio de Esperanto kaj ĉefredaktoro de "Fonto".*

turon daŭresencan kaj nutropovan.

La mondo atentis kaj ĉiam pli estas influata de la sociaj, ekonomiaj kaj kulturaj transformiĝoj en Ĉinio. Ĉiun homon sur la Tero koncernas tiu evoluo. Samtempe ĉiam pli kreskas la intereso pri la kultura heredaĵo, kiun la ĉinoj lasis por la mondo. La kontribuoj de la ĉinoj sur la terenoj de arto, scienco kaj filozofio estas superbaj, tamen ankoraŭ tro malmulte konataj kaj aprecataj en la ĉirkaŭmondo, precipe en la Okcidento. Tradicie, literaturo kaj arto en Ĉinio estis esencaj trajtoj de civilizita homa socio, ili do estas plensente penetritaj de humanismaj valoroj. Ni bezonas pli facilan aliron al tiuj fontoj. Studado de la ĉina civilizacio, kiu, eble pli ol iu alia, donis ĉefatenton al la kontentigo de la homaj bezonoj kaj al la problemoj de

homaj rilatoj, povas nur bonfari al la milionoj da homoj, kiuj sentas sin incitataj aŭ turmentataj de la diversaspecaj, malhumanismaj kondiĉoj, kiuj nun vaste regas en la mondo. Tia studado estas ankaŭ valora, ĉar ĝi malfermas vastan kaj stimulan terenon por esplorado. En epoko, kiam la teknologio ŝajne traesploris multajn el la materiaj misteroj kaj minacas la mondon per siaj atingoj, estas bone, ke novaj perspektivoj malfermiĝu al la studentoj de la humaneco. Kaj ankoraŭ plie, la studado de la ĉina civilizacio provizas favoran pozicion de kiu aliaj popoloj povas rigardi kaj alkompari siajn proprajn civilizaciojn. Precipe tio valoras por la Okcidenta civilizacio, kiu evoluis pli-malpli laŭ malsimilaj tendencoj, kaj bezonas tian korekton, kiu rikolteblas el la ĉina, kiu konservis apartecojn potencialajn por tia aplikado.

Festante la 35 jarojn de la ekzistado de la Esperanto-revuoj El Popola Ĉinio, ĝia diverslanda legantaro esprimas bondezirojn pri daŭrigo de tia humanisma esprimo, kiu ĉiam pli forte sentiĝas sur ĝiaj belaj paĝoj. Ĝi daŭrigu prezenti kaj ekspliki al ni kulturajn valorojn de Ĉinio, ĝian konstruadon de novaj valoroj kaj atingoj. Persone mi dezirus vidi pli da literaturo, pli da poezio el antaŭaj epokoj — ĝenerale, pli sperti la grundon el kiu kreskas nun la futuro de la ĉina civilizacio. Sagaca teksto de tradicio kaj transformado, sub la signo de la humanismo: tia redakcia politiko estas laŭ mia opinio la plej fruktodona en la kultura informado de tiu alte taksata revuo, al kiu mi deziras ĉiam pli progresan vivon.

** Estrarano pri kulturo kaj edukado ĉe UEA.*



Nia peranto Spomenka Štimec

Al la redakcio de EPC

Karaj geamikoj,

Korajn gratulojn okaze de via jubileo — la 35-jara ekzisto.

Via revuo multe kontribuis al la internacia Esperanto-movado, sed ĝi ne estas nur ĉina revuo. Ĝi helpas al ĉiuj legantoj senti apartenon al la internacia Esperanto-komunumo. Imagu la sper-ton, kiam mi renkontas iun nekonatan vojaĝanton en aŭtobuso,

Ĝi apartenas al la internacia Esperanto-komunumo

de SPOMENKA ŠTIMEC (Jugoslavio)

kiu foliumas "El Popola Ĉinio". Mi sentas ne ke li legas ĉinan revuon, sed ke li rilatas al la aferoj al kiuj ankaŭ mi apartenas.

Eniri fremdan domon kaj renkonti tie la EPC-murkalendaron signifas fakte renkonti parteton de sia propra hejmo.

Por ne paroli pri tio kiom da scioj pri Ĉinio vi disemis al ni. La jarcentoj da historio, jarmiloj da diversaj kulturaj objektoj kiuj per "EPC" ĉesis resti nur kaŝitaj trezoroj de Ĉinio, aliris al ni.

Ekzistis jaroj, kiam viaj artikoloj ne allogis nin, sincere dirite.

Sed ni foliumis en viaj paĝoj, renkontadis vizaĝojn kaj pejzaĝojn kaj scivolis.

Dankon, karaj ĉinaj geamikoj, pro via pacienco kaj persisto. Ĉiumonate vi alportas al ni peceton da Ĉinio kaj peceton de nia propra Esperanto-kulturo.

Vi helpis al ni mem ĝoji pri riĉo de Esperanto renkontante vian lingvaĵon.

Fartu bone en la estontaj jaroj, kore salutas

Spomenka Štimec,
EPC-peranto por Jugoslavio
Jan. 1985

Mi revenos al la urbo

de OSIOKA MORITAKA*

(Japanio)

Pekino. Kiomfoje mi aŭdis la nomon en mia knabeco, kvazaŭ nomon de mia patro?

Mia prapatro estis bonzo de Ueno, kie staras la tombo de ŝoguno Tokugawa. Kaj, la patro devus esti tiea bonzo, se li ne mortus en neĝa Siberio kiel venkita soldato post la dua mondmilito.

Li estis lerta en la ĉina lingvo, kaj volis profiti de ĉinoj sub okupado de japanaj agresantoj dum la milito. Li sola venis al Pekino postlasinte la novedzinon kaj la

unuan filon en Tokio. Nebulaj estas miaj memoroj pri dufojaj restadoj en Pekino, kien mi kaj la patrino veturis por vidi la patron, sed karaj, pro ke nur tie mi havis la tempon kunesti kun mia paĉjo. Mi estis kvinjaraĝa, kiam mi vidis la patron lastafoje, kaj de tiam nur aŭdis la vortojn, "via paĉjo", "en Pekino".

Subite por knabo, la milito finiĝis. Mizera estis la posta vivo

* La aŭtoro estas redaktoro de la "Revuo Orienta" de la Japana Esperanto-Instituto.



S-ro Osioka Moritaka (maldekstre) kaj ĉinaj esperantistoj en Japanio

Kiel mi konatiĝis kun Ĉinio?

de LUDOVIKO ENIZAN* (Francio)

En tiu tempo mi estis nova, preskaŭ juna, esperantisto. Mi loĝis en Bretonio, en la urbo RENNES (REN) kaj partoprenis la aktivecojn de la tiama loka grupo kiu regule eldonis la bultenon: "Ora Ulekso".

Mi ne scias kiel atingis nin, la unuan fojon, "El Popola Ĉinio". Mi nur memoras la surprizon, ĉar el malproksimo ni ricevis malmultajn presaĵojn, krome ne belajn, kaj jen subite venis el fora Ĉinio, pri kiu neniu cerbumis en tiu epoko, belaspekta revuo, jam kolore ilustrita.

Kiam mi translokiĝis en la parizan regionon, en 1955, mi instruis en la fervojista medio, kaj

disponis pri EPĈ regule. Do, fakte mi ne scias de kiam mi abonas la revuon, sed mi povas aserti ke mi estas ĝia leganto dekomence.

En 1973 ni kreis Esperantan grupon en Rueil kaj abonigis aliajn esperantistojn, eĉ neesperantistojn, kiuj ŝatis la bildojn.

Jen tiel mi intimiĝis kun "EL POPOLA ĈINIO", kaj iom post iom kun la ĉina popolo kaj fine kun la tuta Ĉinio. Ĉar mi devas konfesi ke EPĈ kvazaŭ knedis mian menson; kvankam ne ĉiuj legaĵoj estis tre variaj en iu epoko, mi multe aprecis la entuziasmon de la popolo por konstrui sian landon.

de postlasitaj tri infanoj kaj la patrino kun avino en kampara urbo, kien la familio fuĝis for de la aeratakata Tokio. Fojfoje nenio manĝebla restis hejme, ne sukero, nek salo aŭ sojsaŭco. Do, herbojn manĝeblajn ni serĉis kaj manĝis.

Senforte sidante ĉe malriĉa kuirejo la patrino kaj avino reciprokis konsolajn vortojn, ke li nepre revenos vivanta, ĝis urba oficejo informis ilin pri la morto de la edzo, de la filo.

Ĉar, mi amis miajn familianojn, mi malamis plenaĝulojn kiuj stulte permesis kreskadon de japana militarismo, kiu forprenis la patron kaj donis suferon al

miaj amataj. Ankaŭ la patro ne estas aparte permesinda.

Plejparto de la rakontoj de mia patrino pri sia fora edzo estis intence kuraĝiga por postlasita filo, sed ŝi mem havis sentojn aman kaj malaman al sia edzo. Al mi ŝoka estis ŝia moko, ke mia patro foje piedbatis ĉinon, kiu postulis de li altan pagon de jinrikŝo. De tiam, mi neniam forgesas la figon de la patro kontraŭ malforta homo, kaj decidis en mia koro, ke mi mem neniam faros la samon. Des pli, ke miaj familianoj malfeliĉas en malvarmaj rigardoj de najbaroj kontraŭ ni, rifuĝintoj el Tokio. Kaj, en mi ĝermis sento pardonpeti al la batita ĉino, kaj volo egalrajte vivi kaj solidareci.



S-ro Ludoviko Enizan kaj lia edzino en nia redakcio

Jam mi estis ĉinema, aŭ ĉinia, kiam viaj reprezentantoj vizitis Francion la unuan fojon, kaj mi troviĝis en la unua rango de la gapantoj tiokaze. (Vidu la dorsflankon de la kovrilpaĝo de EPĈ n-ro 2 de 1980.) Mi levas plej alten la manon por saluti nian gaston.

Tiun tagon, mi tute ne antaŭvidis nian viziton al Ĉinio kaj nian tiean restadon dum julio kaj aŭ-

** La aŭtoro estas franca esperantisto, malnova amiko de nia revuo.*

Tial, la titolo de la gazeto, nomata El Popola Ĉinio, donis al mi apartan senton en unua vido antaŭ dudekelkaj jaroj, ke ĝi pontas min kaj ĉinojn per ĝusta lingvo, Esperanto.

Ĉiam, kiam mi rigardas la gazeton pli kaj pli enhavoriĉan, mi diras al mi, ke nia gazeto la Revuo Orienta konkuru kun ĝi por fariĝi pli solidaj komunikiloj de pacamaj popolanoj.

Okaze de la tridek-kvin-jara datreveno de la eldoniĝo de la gazeto, mi sincere gratulas ĉinojn. Kaj mi promesas, ke mi revenos al Pekino en la jaro 1986 kiel unu el la japanaj popolanoj al la 71-a Universala Kongreso de Esperanto.

Ĉinaj gejunuloj kaj moderna vivmaniero

La vivmaniero ne nur koncernas kutimon pri vestado, manĝado, loĝado kaj veturado, sed ankaŭ spegulas spiriton de la homoj kaj ilian ideologion, eĉ influas la ekonomian disvolviĝon kaj socian evoluon. En la nuna Ĉinio la reformo de la vivmaniero vekis eĥon de la socio, precipe ĉe la gejunuloj. Lastatempe la ĵurnalo Ĝonggŭo Ĉingnjan (Ĉinaj Gejunuloj) malfermis rubrikon por diskuti pri "Gejunuloj kaj la Moderna Vivmaniero". Multaj gejunuloj kaj iuj maljunuloj ne nur kritikis malnovajn konceptojn malhelpantajn la socian reformiĝon, sed ankaŭ varme diskutis pri kreado de civilizita, morala kaj scienca vivmaniero. Ĉi tie estas kelkaj fragmentoj el la ĵurnalo.

— LA RED.

LA EPOKO PROGRESANTA POSTULAS REFORMON DE VESTOJ

TANG HŪA de Hunan-prov.

En la nuna vivo de Ĉinio ankoraŭ ekzistas nemalmultaj konservativaĵoj, kiuj malhelpas kreon de nova vivmaniero. Prenu vestadon kiel ekzemplon; multaj homoj taksas aliajn laŭ iliaj vestoj. Se vi vestas vin laŭ modo, iuj diras ke vi tro atentis pri la ekstera aspekto. Se vi portas bone gladitajn vestojn kaj paŝas per elegantaj paŝoj, aliaj opinias, ke vi tenas la nazon supren. Oni asertas, ke homo inklina al rafinita vestado devas elteni premon de jenaj ĉikanoj:

Ne ŝati lernadon, sen ambicio, sen kapablo, sen diligenteco; scii nur sin beligi, sin admiri, sin apartigi de la kamaradoj; esti trafita de la okcidenta kulturo, esti epikurano kun spirita vanteo; vivi prodige, forgesi la proprecon de la laboranta popolo; strebi al modo, sin afekti; ktp.

gusto 1983, kiujn mi rakontis en la n-ro 5 de 1984.

Ĉu longa estis la vojo de 1950 ĝis 1985? Por mi tute ne; sed ne certe samopinias la ĉina popolo, kiu foje tramarŝis dornplenajn padojn. Tia estas ofte la sorto de ĉiu, homo aŭ socio, kiu sopiras al sia digno. Ne sufiĉas lerta fajfo por starti el mezepoka situacio, kaj trafi la zeniton, per raketoj, en la daŭro de 35 jaroj.

Permesu ke ni ĝoju kun vi hodiaŭ, pro viaj sukcesoj, kaj vin gratulu. Precipante dankon ni ĉiuj ŝuldas al vi pro viaj atingoj en ESPERANTO.

Pollando estas la lulilo de Esperanto; mi pensas ke Ĉinio estas ĝia vartejo. Via registaro oficiale ĝin agnoskis, subtenas kaj tute bone flegas por ke ĝi kresku kaj disvastiĝu. De 35 jaroj, kaj pli, la diversaj ĉinaj registaroj neniam modifis sian sintenon je Esperanto, krom alporti pli fervoran favoron. Al tuta popolo, E. estas prezentata ne kiel fia ĵargono, sed kiel vera lingvo, kies celo estas ebligi al la tuta homaro la komunikadon, la interkompreniĝon kaj amikiĝon.

Esperanton vi surpodiigis en via vasta lando kaj krome vi alportas gravan helpon al la tut-

monda esperantistaro per via trafa kaj konstanta laboro diversflanka, precipe per la bonege popularita materialo, ne nur per la revuo EPĈ, sed ankaŭ per multaj aliaj eldonaĵoj.

Mi ne povas fini, kaj silenti pri la Esperanto Sekcio de Radio Pekino, kiu alportas ĉiutage al ni la plej freŝdatajn novaĵojn de via popolo kaj lando.

Iam oni povis legi: "Oriento ruĝas". Hodiaŭ ni povas skribi: ĈINIO VERDAS, LUMAS KAJ PRILUMAS.

* La aŭtoro estas franca esperantisto, nia malnova amiko.



Malgranda problemo pri vestado vekas tiel multajn kulpigojn. Malgraŭ la realo iuj homoj laŭplaĉe prenas ilin kiel spiritajn ŝnurojn por kateni tiujn homojn varme amantajn la vivon kaj sin mem, por ke ili blinde kontentiĝu pri la realo, timu reformon, perdu sian vigecon kaj debiliĝu antaŭ maljuniĝo. Tia pensmaniero nepre devas esti forigita.

MIA OPINIO PRI VIVMANIERO

GJAŬ MINGĜI de Ljaŭning-prov.

Kio estas nova vivmaniero, kiu spegulas la fizionomion de nia epoko? Mi opinias, ke diligente lerni, pene labori kaj laŭeble ĝui estas la vivmaniero proponinda al la nunaj ĉinaj gejunuloj. La menciitaj tri punktoj estas unu tuto. Nun la nova teknika revolucio impetas kontraŭ la tuta mondo kaj la scienco kaj tekniko disvolviĝas kun ĉiu tago. Por sin konformigi al la senĉese renoviĝantaj scioj, oni nepre devas diligente lerni kaj posedi pli da scioj, kaj nur tiel oni povas plenumi sian oficon. En la moderna granda produktado kaj rigora scienca administrado, ĉiuj laborantoj devas esti en altgranda mensa streĉiteco kaj pene labori, alie oni ne povas gajni pli da rekompenco kaj ne havas materian garantion por ĝuo. Nia reformo de ekonomia sistemo kaj la moderniga konstruado ĉefe celas maksimume kontentigi la ĉiam kreskantan bezonon de la popolo pri materia kaj spirita vivo. Oni ĝuas ja por bone lerni kaj labori. La interliganta strukturo de la tri flankoj devas esti la vivmaniero de la modernaj ĉinaj gejunuloj.

MALRIĈECO NE KONFORMAS AL LA MODERNA VIVO

LU JUNSAN de Henan-prov.

La familio de juna kamparanino Li Kunlan, kies jara enspezo atingis dekmil ĵuan-ojn, aĉetis televidilon, magnetofonon, elektroventumilon, motorciklon kaj altklasan meblaron kaj konstruis 11-ĉambran domon el grizaj brikoj. Ŝi portas okcident-stilajn kostumojn kaj altakalkanumajn ledŝuojn kaj veturas per motorciklo. Sekve ŝia ago estis riproĉata de tiuj kiel burĝa vivmaniero.

Pri tio, mi volas diri kelkajn vortojn en la rubriko "Gejunuloj kaj la Moderna Vivmaniero".

Antaŭ kelkaj jaroj la familio de Li Kunlan estis tre malriĉa. Ŝi havis nur tri-ĉambran pajlan kabanon. Ekde 1979 ŝi fariĝis landfama persono, kies jara enspezo atingis dekmil ĵanojn dank' al sia diligenta kaj scienca terkulturado. Ŝi manĝas kaj sin vestas bone per la perlaborita mono. Kun la senĉesa disvolviĝo de la moderniga konstruado, la produktaĵoj ĉiam pli multiĝas, la enspezo de la popolo kreskas senĉese kaj la konsumado kompreneble leviĝas al pli alta nivelo. Nia vivmaniero ne devias de la socialisma vojo, tia vivmaniero karakterizita per la epoka spirito estas konsekvenca rezulto de la produkta disvolviĝo.

FORSKUU LA MALNOVAJN KONCEPTOJN, NIAJ GEPATROJ

DING ĜJE de Hubej-prov.

Mi ĵus abiturientiĝis kaj havas miajn proprajn opiniojn pri la sociaj problemoj. Mi ŝatis fari

miajn rimarkojn ĉe manĝotablo hejme. Sed, kiam mia opinio malsamis kun tiu de mia patro, li arbitre malpermesis al mi paroli. Sendube, ne ĉiu el miaj opinioj estas absolute ĝusta, tamen la sinteno de mia patro ofte ĉagrenis min. Pro tio en la hejmo mi ne eldiris plu miajn opiniojn kaj parolis malmulte. Sed mi ĝojas gastigi ĉe miaj kamaradoj kie regas demokratia atmosfero; tie mi povas diskuti pri problemoj kun iliaj gepatroj en egala pozicio. Tie mi povas ellerni multe de ili kaj ĝustigi miajn erarajn opiniojn. Laŭ mia opinio la moderna familio devas respekti demokration, ĉiuj ĝiaj familianoj ĉu junaj ĉu pli aĝaj devas havi egalan rajton, kio sendube utilas al la gejunuloj en ilia sana kresko.

La hodiaŭaj gejunuloj preferas sin vesti mode kaj bele, ŝatas muzikon kaj dancon. Ĉio ĉi tio estas deca. Sed iuj gepatroj tion riproĉas, opiniante siajn gefilojn sentaŭgaj, nemalproksimvidaj kaj deflankiĝantaj de la propra okupo.

Pro tio mi krias laŭte pere de via ĵurnalo al la gepatroj kun la malnovaj konceptoj: Ne rigardu la nunajn gejunulojn per eksmodaj rigardoj, sed subtenu ilin en ilia strebo al nova vivmaniero! Alie, vi estas forlasitaj de la epoko!

ŜANGĤIGAS NIA VIVO

SI HŬA de Hebej-prov.

Mi havas tri infanojn, ili ĉiuj lernas diligente. La unua filo diplomiĝis el la televida universitato, la filino ankoraŭ lernas en la televida universitato kaj la dua filo studas en supera lernejo. Ili havas malsamajn karakterojn kaj interesojn. La filino kaj la unua filo vivas modeste, dum la dua filo ŝatas sin vesti laŭmode, elspezas malavare, kaj urĝas nin aĉeti fridujon, elektroventumilon, televidilon k. a.

Mi ofte admonis mian etan filon al bonkonduco kaj ripetadis al li la pasintan malriĉan vivon. Sed li rebatis min: "Via malnova koncepto estas tro forta. Nia respubliko jam aĝas 35 jarojn, kontentiĝi je malriĉa vivo ne taŭgas por kuraĝigi la homojn antaŭeniri." Mi kritikis lian malriĉulan prodigon, sed li refutis: "Se la enspezo permesas, oni ja devas senĉese altigi la vivnivelon." Ankaŭ mia edzo diris simpatie: "La efektivigo de la kvar modernigoj celas ja por altigi la popolan vivnivelon, prefere ne ripetadi la pasintan malriĉecon." Ankaŭ la aliaj du infanoj opiniis, ke mi veturas en bovĉaro.

Glaci-hokeaj sportistinoj



Tial mi fariĝis izola en la familio. Miaj edzo kaj gefiloj grumblis, ke mi longe distancas de la epoko. Influate de ili, mia penso iom post iom ŝanĝiĝis post longa pripenso kaj fine mi permesis al ili aĉeti drapajn surtutojn, okcident-stilajn vestojn, altakalkanumajn ŝuojn kaj la elektrajn aparatojn. Antaŭe la laciga vestolavado tre dolorigis miajn lumbon kaj krurojn. Nun la lavmaŝino ŝparas por mi multe da forto kaj tempo, tial ankaŭ mi ekhavis tempon por legado. La edzo kaj infanoj laŭdas ke mi estas familia reformisto dum miaj gefiloj ne perdis sian idealon, sed lernas pli diligente. Mi pensas, ke la moderna vivmaniero ne signifas luksan vivon, ne malhelpas la lernadon kaj laboron, sed inspiras la homojn al pli bona lernado kaj laborado.



En beligejo

LA TEMPO NIN PROVOKAS

LEJ MING de Gujĝou-prov.

Ni vivas en la epoko postulanta seriozan tempan efikon kaj ĉiam pli precizan tempon, tial oni devas alte taksii valoron de la tempo, ĉar la tempa efiko koncernas la socian evoluon. En unu sekundo ultrarapida aviadilo flugas unu kilometron kaj avangarda komputero povas fari cent milionojn da kalkuloj. En unu minuto Ĉinio povas produkti dekojn da tunoj da ŝtalo kaj pli ol cent tunojn da petrolo. Oni povas diri, ke tempo ja signifas valoron kaj riĉaĵon.

Influate de miljaraj etproduktaj kutimoj nemalmultaj homoj ne taksas la tempon. Iuj kritikis, ke ni kutimiĝis al malrapideco kaj ni ĉiuj agas tiele, senescepte ĉu superuloj, ĉu subuloj. Mi opinias, se la takto de nia vivo ankoraŭ restos tiel malrapida, la modernigoj fariĝos senfruktaj.

La tempo provokas ĉiun el ni vivantaj en la moderna socio. Ni devas agordiĝi al la frekvenco de la tempo.

KONSUMADO DEVAS ADAPTIĜI AL LA ENSPEZO

de ĈIN FEN


En mia fabriko estas 26-jara laboristo. Li zorgas malmulte pri sia laboro kaj la gepatroj, nur pri sia vestado. En lia kofro troviĝas diversaj modaj vestoj. Antaŭ nelonge li refoje aĉetis multekostan kostumon. Li aspektas ja bele dank' al modaj vestoj, sed oni kulpigis lin pri lia malriĉa



Studentinoj en dimanĉo

lukso, ĉar li ŝuldas multe da mono pro aĉeto de la vestoj, kaj plejparto de la mono estis pruntita antaŭ du jaroj. En la lastaj jaroj oni trifoje svatis lin, sed informiĝinte, ke li estas ornamemulo tamen malriĉa, la knabinoj rifuzis konatiĝi kun li. Kian utilon al li portos la vanta ŝato de vestoj?

La individua enspezo ĉiam estas limigita, tial oni devas elspezi laŭ sia enspezo. La supre menciita junulo estas bel-ama, sed senbaza, li forlasis la tradician moron de penema, diligenta kaj ŝparema dommastrumado de la ĉina laboranta popolo.



He Šišji en verkado

HOŬ GJŬELJANG:

28A-GENERACIA ĈINMEDICINISTO HE ŜIŜJI

LA ĉina medicino estas tradicia. En la pasinteco plejparto de la ĉinmedicinistoj lernis ĝin ne en lernejoj, sed ĉe specialistoj. Iuj heredis ĝin de siaj prapatroj. Multaj eminentaj kuracartoj estas heredataj de generacio al generacio kaj havas iagradan disvolviĝon hodiaŭ. He Ŝiŝji, kiun laŭdis pekinaj ĉinmedicinistoj en kunveno okazinta en la lasta jaro, estas elstara ĉinmedicina kuracisto de la 28-a generacio.

Lia familio estas ĝis nun konata ĉinmedicinista familio kun plej longa historio. La unuageneracia medicinisto de la familio estis He Janjoŭ, kiu vivis en la 12-a jarcento. Oni diras, ke komence He Janjoŭ ne estis kuracisto, sed ŝtatoficisto de la kortego. Poste li juste kaj malkaŝe kritikis la kortegon kaj pro tio estis eksigita. Ekde tiam li vivis de medikament-vendado kaj kuracado.

De tiu tempo la kuracarto estis heredata de generacio al generacio, kadre de la familio, kaj tio daŭris jam 800 jarojn ĝis nun. En tiuj jaroj pli ol 300 familianoj fariĝis ĉinmedicinistoj, el kiuj nermalmultaj estis famaj. Ekz., ĉin-

medicinisto He Ŝutjan de la 23-a generacio, kiu vivis en la 40-aj jaroj de la 19-a jarcento, estas laŭdata eĉ hodiaŭ pro sia eminenta kuracarto. Li iam kuracis la pied-malfortiĝon de Lin Zeŝju, gvidanto de kampanjo kontraŭ importo de opio, kaj provfaris abstinencajn pilolojn, kiuj estis vaste uzataj. Li verkis libron pri opi-abstinado kaj el medicina vidpunkto traktis pri tokseco de opio kaj ties difekto al la sano. Ankaŭ lia filo He Hongfang estis eminenta ĉinmedicinisto, kiu bone kuracis skistosomozon. En la 40-aj jaroj de la kuranta jarcento iu japano volis aĉeti liajn preskribojn je alta prezo, sed vane. Estas pli ol 300 preskriboj postlasitaj de He Hongfang. Pro la eminenta kuracarto sep el la familio fariĝis altranguloj de la imperiestra hospitalo kaj 22 servis kiel kuracistoj de imperiestroj.

Jam en la infaneco He Ŝiŝji lernis de sia avo medicinon kaj heredis kuracajn spertojn kaj metodojn de siaj prapatroj. Poste li trapasis eniran ekzamenon de ĉinmedicina instituto kaj tie li pli sisteme kaj pli profunde studis la tradician ĉinan medicinon.

He Ŝiŝji estas lerta en kuracado de internaj kaj virinaj malsanoj, precipe en kuracado de dismenoreo longe turmentanta virinojn. Kiam ripetiĝas la malsano, iuj suferantoj ŝvitegas kaj turniĝas sur la tero, kun manoj kaj piedoj purpuriĝintaj. Por forigi la suferon, He Ŝiŝji kun plena energio serĉis kaŭzojn de la malsano. Li trovis, ke kvankam la suferantoj havas preskaŭ samajn simptomojn de la malsano, tamen ĝiaj kaŭzoj estas tre diversaj: malvarmumo, sangostazo, akuŝo, preno de tro da malvarma manĝaĵo kaj manko de sufiĉa vitala energio. Li konkrete analizis la simptomojn kaj kaŭzojn de la malsano de ĉiu suferanto kaj kuracis ĝin per medikamentoj kun malsamaj ecoj, tiel ke la suferantoj kuracitaj de li senescepte resaniĝis.

Por altigi la kuracefikon, He Ŝiŝji multe studis antikvajn preskribojn. Anstataŭ blinde sekvi ilin, li lerte aplikis medikamentojn al malsamaj malsanoj. Dank' al tia studo li bone komprenis la rilatojn inter medikamentoj. Ekz., dolĉaj medikamentoj povas helpi la difuziĝon de pikaj medikamentoj. Preskribo devas proponi ne

nur varmecajn, sed ankaŭ malvarmecajn medikamentojn, ĉar la antaŭaj estas tonikaj kaj la lastaj refreŝigaj.

Al li estis fremda la okcidenta medicino en la unuaj jaroj de lia lernado. Poste li turnis sian atenton al lernado de ĝiaj teorio kaj esploraj metodoj. Li kombinis la ĉinan kaj okcidentan medicinojn kaj per tio altigis sian kuracarton. Iu klientino suferis kronikan pelvan inflamon. Iuj kuracistoj opiniis, ke ŝia malsano estas nekuracebla kaj ke ŝi ne gravediĝos eĉ post resaniĝo. Sed He ne tiel pensis. Li faris korpan ekzamenon al la suferanto, kombinante la medicinojn ĉinan kaj okcidentan. Li kuracis ŝian malsanon per tradiciaj ĉinaj tonikaj medikamentoj ne uzataj ĉe la okcidenta medicino, tiel ke ŝia malforta korpo reakiris la energion. 40 tagojn post la resaniĝo ŝi gravediĝis.

Estas distingiĝaj la kuracmetodoj de He Ŝiŝji. Li aplikas iujn kirurgiajn kuracmetodojn al kuracado de internaj malsanoj. Ĉe kirurgio oni uzas drogojn por rapide resanigi vundon. Li enkondukis tiun metodon en kuracadon de koronaria kormalsano en la resaniĝa tempo, t.e. kuraci ĝin per muskol-kreskiga medikamento por iom post iom resanigi la difektitan kardiovaskulon.



Premio donita de la Ĉinmedicina Instituto al He Ŝiŝji

He Ŝiŝji ankaŭ estas diligenta en verkado. Li verkis pli ol dek librojn, el kiuj la ĉefaj estas "Por Gravedulinoj" kaj "Ginekologiaj Scioj". Li zorgeme redaktis verkojn de siaj prapatroj kaj kompilis "Libraro pri kuracarto de He-Familio", kiu konsistas el 34 libroj kun pli ol tri milionoj da ideogramoj. Nun li estas okupita de polurado de "Biografioj de 15 000 Ĉinmedicinistoj", enhavriĉa libro kun 1.5 milionoj da ideogramoj. Ĝi rakontas pri laŭ-

dindaj faroj de tiom da antikvaj kuracistoj. Por verki ĝin, li konsultis diversajn librojn ekde la 30-aj jaroj por kolekti materialojn. Li komencis la verkadon nur en la fino de la 60-aj jaroj. Fininte la verkon, li ordigos verkojn postlasitajn de lia instruisto, kun ĉ. 1.2 milionoj da ideogramoj. Pro la verkado li longe ne okupis sin pri kuracado kaj tio sentigis al li ian perdon. Li intencas daŭrigi sian kuracadon, post kiam li finos la verkojn.

"Certe estos sukceso gratulinda", vortoj skribitaj de Lin Zeŝju por He Ŝutjan



De la antikveco He-familio havas sian kuracistan moralon. Ĝi akceptis klientojn tute egale, ĉu ili estas pagipovaj aŭ ne. Iuj el la prapatroj provizis sian hejmon per malsanulaj litoj por senpage akcepti klientojn venintajn de malproksime. Kiel ili, He Ŝiŝji senpage kuracis nemalmultajn malsanulojn, ne postulante donacon nek regalon. Antaŭ nelonge li donacis al la ŝtato pli ol 400 altvalorajn librojn kaj manuskriptojn postlasitajn de liaj prapatroj. La ŝtato donis al li grandan monsumon kiel premion, kiun li tamen donacis al la Ĉinmedicina Instituto kiel fonduson por kulturi ĉinmedicinistojn kaj fari statuojn de dek eminentaj ĉinmedicinistoj de la antikva Ĉinio. Liaj verkoj eldoniĝas unu post alia. Li intencas doni al la ŝtato ankaŭ sian honorarion. Li ĝojas, ke liaj verkoj kaj tiuj de liaj prapatroj estas publikigitaj kaj per tio li kontribuas al la ĉina medicino.

Preskaŭ ĉiuj posteuloj de la familio He interesiĝis pri ŝatokupoj. Ekz., He Ŝutjan verkis poemojn, vaste konatajn en Ĉinio. He Hongfang estis fama kaligrafo. La preskriboj, bele skribitaj de li, estas kaligrafiaj artaĵoj, kiujn oni tre volis havigi al si por konservi. Kiel siaj prapatroj He Ŝiŝji amas teatron, muzikon, belskribon kaj luktarton. En sia juneco li prezentis pekinan operon, kion aplaŭdis spektantoj. Kaj nun troveblas disko de operaj kantoj prezentitaj de li. Li faris pli ol 20 verkojn pri teatro. Li estas esploristo de la Pekina Instituto pri Teatro. Ĉiutage post verkado li ludas antikvan sepkordan liuton aŭ aŭskultas diskon. Li scias kiel longigi sian vivon. Li amuzas sin per muziko kaj praktikas sporton kun regula vivmaniero. Kvankam maljuna, li estas plena de energio.

KORESPONDI DEZIRAS

Tarifo: 1 internacia respondkupon por 5 vortoj aŭ mallongigoj. **Por fotoj:** 1 intern, resp. kup. por spaco de 1 linio. **Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato.** Esp. organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. **La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.**

- * 18-jara studentino de gimnazio Lenka Kuskova, Pod Lipou 1665, 508 Ol Horice, Ĉeĥoslovakio. Intereso: interŝanĝo de bildkartoj, skiado, vojaĝado, turismo, legado kaj muziko.
- * 44j. Lothar Vogel, 2808 Neustadt-Glawe, Lenin str. 1, DDR, deziras korespondi kun ĉinaj geesperantistoj pri fervojo, trafiko kaj kolekti b.k.
- * Modesta junulo deziras korespondi kun geesperantistoj el la tuta mondo, aparte kun fraŭlinoj kiuj dezirus krei esperantan familion. Intereso: literaturo, muziko, sporto, ktp. Ahmed Kavazoviĉ, 79268 Stari Majdan, Sanski Most, Jugoslavio.
- * 24-jara Kedves Lazar, Str. Alszeg 1522, Sindominic, Harghita, 4142, Rumanio, dez. kor. tutm. pri ĉiuj temoj.
- * 18-jara Both Jolan-Rita, Kozep-tiz. 380, Sindominic, Harghita, 4142, Rumanio, dez. kor. amikoj pri diversaj temoj.
- * Tadeusz Lisowski, Tornu 87-100, Wybickiego 37m.l, Pollando, interesiĝas pri filozofio, religioj, poeziaĵoj, vojaĝado kaj fotografado.
- * Emeritulo deziras korespondi kun geesp-istoj tutmonde. Adreso: Georges Gaspard, Impasse Berthelot 26100, Romans, Francio.
- * 32-jara submastro Denis Lawglois, 36 Sauriol 1, Laual-Des-

Rapides, Kebekio, Kanado H7N3A6, dez. kor.tm. pri pm. k. pk.

- * Teresa Muracoska, 02-934-Warszawa, ul. Spalska 5 m 24, Pollando, interesiĝas pri turismo, teatraĵo, filmo kaj muziko.
- * Mezaĝa instruistino de la angla lingvo dez. kor. kun geinstruistoj ĉefe el Ĉinio, Francio, Italio aŭ Svislando. Silja Kivekas, Paijanteenkatu 1 A 4, 15140 Lahti, Finnlando.
- * Geedzoj s-ino Rita kaj s-ro Hans-Jorg Bloom intencas viziti la 71-an Kongreson en Pekino. Ili serĉas leteramikojn el Pekino aŭ el la regiono de Pekino. Bv. skribi al familio H.-Jorg kaj Rita Bloom, Am Kirchensiek 29, D- 3370 Seesen, Fed. Respubliko Germanio.
- * 37 jara s-ro Nils Alvar Eksten, P.K. 4050 S-261 04 Landskrona, Svedujo, deziras korespondi ĉiam kun knabinoj kaj junulinoj el la tuta mondo. Mi laboras kiel sindiko por psikaj malsanaj homoj. Bv. skribi ĉiuj kiuj havas interesiĝon por kor. kun simpla sveda junularo. Respondo volonte kun foto(j).



S-ro Nils Alvar Eksten

- * Lernantoj de la elementa lernejo en Yawata dez. kor. kun ĉiuj landaj lernejoj, interŝanĝi desegnaĵojn, skribaĵojn (leteroj), pk., pm., fotojn, lern-librojn, ktp. Skribu al s-ro Masao Yoshimoto, 610-01, 6-164, Shimo-Otani Kuze, Joyo-city, Kyoto-fu, Japanio.

U JI:

HOLOGRAFIO EN ĈINIO



En holografia ekspozicio

LONGE en la pasinteco oni senĉese klopodis por fari foton pli reliefa, pli profunda, kaj havigi al ĝi tri dimensiojn per metodoj de geometrio kaj perspektivo. Sed oni ne rikoltis bonan efikon. En 1947 hungar-devena brita fizikisto D. Gabor prezentis imagon pri holografio. En la sesdekaj jaroj la nove naskita lasera tekniko estis enkondukitita en la holografian kampon. Nur ekde tiam oni povas vive prezenti reliefan bildon de objekto sur ebena.

En la komenco de la sepdekaj jaroj Ĉinio ekstudis la laseran holografion. En la lasera ekspozicio okazinta en la printempo de 1973 en Tjanĝin oni montris la unuan hologramon faritan de Ĉinio mem. Poste en iuj altlernejoj kaj scienc-esploraj institutoj oni faris fundamentajn eksperimentojn pri holografio kaj studon de ĝia apliko. En la komenco de la okdekaj jaroj tia studo en Ĉinio jam atingis la mondan nivelon en multaj avangardaj kampoj kaj fariĝis tre vigla branĉo de la optika studo.

Por akceli la popularigon de la holografia tekniko kaj levi la sciencan kaj kulturalan nivelon de la popolo, la Ĉina Optika Asocio okazigis antaŭ nelonge tutlandan ekspozicion de scienc popularigo de holografio. La ekspozicio diferencis de la aliaj per tio, ke ĝia halo estis obskura, nur antaŭ ĉiu foto pendis lumĵetilo. La hologramo sur la foto estas videbla nur kun helpo de ĝia lumo. Tio dependas de la holografio mem.


Lumo antaŭeniĝas kiel akva ondo. Ĉiuj informoj de lum-ondo konsistas en amplitudo kaj fazo. Oni vidas objekton ricevinte per la okuloj amplitudon kaj fazon de lum-ondo reflektita de la objekto. Ĉe la ordinara fotografado oni registras nur la lum-ondan amplitudon reflektitan de objekto, tial la foto montras ebenan figuron de la objekto.

Ĉe holografio, anstataŭ uzi fotoaparaton, oni ĵetas faskon da lumo sur fotografotan objekton, de kiu reflektiĝas la lumo, nomata lumo de objekto. Poste oni sendas ĉi tiun kaj referencan lumon sur holografian plakon, la du faskoj estigas interferon kaj la plako registras la signojn de tiu

interfero — jen eksponado. Post rivelado kaj fiksado oni ricevas holografian foton. Holografio bezonas forte interferan lumon kaj por ĝi taŭgas laserradioj, tial la naskiĝo de lasero progresigas la holografian teknikon.

Sur holografia foto troviĝas densaj nigraj kaj blankaj strioj, t. e. interferaj strioj. Kiam lumĵetilo verŝas lumon sur holografian foton, aperas la reliefa bildo de fotita objekto. Tio okazas pro difrakto. Plejparto de la fotoj en la ekspozicio estas farita per tia metodo kaj nomata reflektita holografiaĵo. Kun admiro oni rigardas la delikatajn artfotojn kvazaŭ verajn objektojn lokitajn malantaŭ vitro. Estas foto de vekhorloĝo, kiu aspektas vera. Ŝajnas, ke ĝiaj dentradoj turniĝas. Starante apud ĝi, oni kvazaŭ aŭdas ĝian tiktakon. Ankaŭ fotoj de padelrado, glitkalibrilo kaj malgranda lagro impresas tiel versimile, ke oni povus tuj kapti ilin per mano.

En la ekspozicio troviĝas ankaŭ diafanaj holografiaĵoj kaj la revidiga lum-fonto estas post la fotoj. Lum-fasko trairas ilin kaj reapergas la originalan aspekton de ob-



Esploristoj faras holografian eksperimenton.

jekto. La bildo "Gruoj" prezentas grupon da belaj gruoj, el kiuj iuj blekas kun levita kapo, aliaj kviete promenas, triaj kombas siajn plumojn per la beko, kvaraj serĉas fiŝojn en akvo. . . Kia viveco!


Hologramo povas plastike redoni la originalan aspekton de objekto, eĉ kiam ĝi estas dispartigita. Se oni disŝiras ordinaran foton, ĉiu ĝia peco konservas nur ĝian partan kaj ne tutan bildon. Se tio okazas al hologramo, ĉiu ĝia parto povas redoni la tutan bildon de fotita objekto. La kaŭzo kuŝas en tio, ke ĉiu punkto sur hologramo registris ĉiujn informojn de la fotografata objekto. Tial ĉiu fragmento ricevinta la interferan lum-faskon redonas la tutan bildon de la objekto. Komprenible ĉiuj pecoj prezentas la bildon ne de sama flanko nek sur sama fono, ĉar ili ne estis sur sama loko antaŭ la dispartiĝo.

Nun ni rigardu tri turniĝantajn cilindrajn holografiaĵojn en la

ekspoziciejo, kun figuroj de bonzo Ŝjūanzang kaj liaj disĉiploj Simio Sun Ukong kaj Porko Baĝje el la antikva ĉina mita rakonto "Pilgrimado al la Okcidento". La bonzo murmuris sutron, kun duonfermitaj okuloj kaj kunmetitaj manoj. La ĉiopova Sun Ukong, kiu tenas magian bastonon per unu mano kaj gratas sin tie kaj ĉi tie per la alia, estas tre ŝatata kaj de maljunuloj kaj de infanoj. La stulteta Baĝje kun grandaj ventumantaj oreloj ridigas la rigardantojn. La turniĝado de la cilindroj ebligas vidi ne nur ĉiujn iliajn profilojn, sed ankaŭ iliajn moviĝantajn figurojn, kvazaŭ montrante relieffajn movbildojn.

Tia cilindra holografiaĵo estas nomata 360-grada holografiaĵo. Ĝi, aspektanta kiel vitra cilindro, surhavas multajn striojn da hologramoj. Antaŭ la turniĝanta cilindro oni vidas sinsekvon da prilumataj hologramoj, en kiuj figuroj moviĝas kaj impresas reliefe.

Holografio servas ne nur al la kultura vivo, sed ankaŭ vaste al la nacia ekonomio. Oni uzas ĝin en trejnado de aviadistoj. Holografia mikroskopo povas multe efikigi observadon kaj pligrandigi la observatan objekton kaj tiel profundigi la biomedicinan studon. Oni ankaŭ uzas holografion por reprodukti antikvajn restaĵojn kaj fari braceletojn, portretojn kaj pejzaĝajn bildojn. Oni enkondukis holografion en presadon de libro-ilustraĵoj, poŝtmarkoj, poŝtkartoj, novjaraj bildkartoj, relieffaj mapoj kaj afiŝoj. Kun senĉesa disvolviĝo de teknologio, holografio havos brilan estontecon kaj pli buntigos la estontan mondon de lumo.



ĈANGŜA — GRANDA URBO EN CENTRA ĈINIO

de JANG KAJJŪAN

Njanĝja-lago Foto de LJU ĜIGŪO

La aŭtoro estas direktoro de la Ĉangŝa-a Filio de la Ĉina Internacia Turisma Servo kaj ankaŭ vicprezidanto de la Hunan-a Esperanto-Asocio. En 1984 li kaj liaj kolegoj trifoje akceptis Esperantajn vojaĝ-grupojn kaj turistojn. Lia artikolo esprimas bonvenon al la eksterlandaj esperantistoj partoprenontaj la 71-an UK, ke ili vojaĝu al Ĉangŝa. Nun la unua vojaĝ-linio, rekomendita en nia revuo, ekhavas la urbon Ĉangŝa post Pekino, Ŝji'an, Lüojang kaj Ĝengĝoŭ kaj finiĝas per Kantono.

— La Red.


Ĉangŝa, la ĉefurbo de Hunan-provinco, estas antikva urbo. Jam antaŭ pli ol 2 000 jaroj tie aperis urbeto. Post kiam la Unua Imperiestro de Ĉin-dinastio unuigis Ĉinion en 221 a. K., la tuta lando estis dividita en 36 prefektujojn, inter kiuj estis Ĉangŝa. Poste Ĉangŝa iom post iom fariĝis politika, ekonomia kaj kultura centro de Hunan-provinco. La urbo kun proksimume miliono da loĝantoj, en la mezo de la provinco, iom pli norde, estas ĉirkaŭita de montoj kaj trakurata de Ŝjangĝjang-rivero. Nun la urbo kovras 218 kvadratajn kilometrojn. Tie la klimato estas agrabla kaj pluvoza kaj la kvar sezonoj klare distingeblaj.

En Ĉangŝa estas multaj historiaj objektoj, inter kiuj la plej raraj estas la objektoj elterigitaj ĉe la tomboj de Maŭangduj en la

orienta antaŭurbo. En 1972 kaj 1974 tie oni prifosis tri tombojn de la Okcidenta Han-dinastio antaŭ 2 100 jaroj. La mastro de la tombo n-ro 2 estis Li Cang, markizo Daj. En la tombo n-ro 1 kuŝis lia edzino kaj en la tombo n-ro 3 lia filo. La virina kadavro de la tombo n-ro 1 estas humida kaj sendifekta kaj konserviĝis plejparto de la haroj. Iuj el ŝiaj artikoj estas eĉ flekseblaj kaj molaj histoj elastaj. En la tomboj n-roj 1 kaj 3 estas 500 lakitaj manĝaĵoj, vinuoj kaj komba garnituro. La zorge faritaj lakaĵoj havas freŝajn kolorojn kaj belajn desegnojn. Tie oni trovis 30 specojn da silkaj libroj kun 120 000 ideografiaĵoj pri astronomio, filozofio, historio, geografio, medicino k.a. Tie estas ankaŭ armiloj kaj muzikiloj, kolorigitaj lignaj muzikistoj kaj servistinoj, brodaĵoj kaj gazaj vestoj. Tiuj objektoj estas

valoraj por esplori la politikon, ekonomion, kulturon, sciencojn kaj teknikon de Ĉinio antaŭ 2 100 jaroj. Dekomence, kiam ili estas eksponataj en la provinca muzeo, ili ĉiam allogis al si multajn en-kaj eksterlandajn vizitantojn. Tie oni povas aĉeti ankaŭ kopiaĵojn de antikvaĵoj.

Ĉe la urbo estas multaj famaj pitoreskejoj, kiaj Jŭelu-monto kaj Oranĝa Insulo. Jŭelu-monto staras okcidente de Ŝjangĝjang-rivero. Tie printempe kaj somere prosperas verdaj arboj kaj aŭtune pompas ruĝaj folioj. Tiu naturparko troviĝas nur je 4 km. for de la urbocentro. Sur la montosupro staras Ŭangŝjang-kiosko, kiu ebligas okulplaĉan birdrigardon al la tuta urbo. Ĉe la montotalio estas Luŝan-templo, konstruita en 268 p.K. Ĝi estas unu el la plej antikvaj temploj en Hunan-provinco. Antaŭ la tem-



*Trinkilaro simbolanta long-
vivecon (Artisma porcelanaĵo)*

Foto de **FU GAŬSJUN**

plo kreskas paro da podokarpoj kun aĝo de pli ol 1 700 jaroj. La kiosko Aj'ŭan, ombrita de mont-floroj, antikvaj arboj kaj ruĝaj folioj, estis konstruita en 1792. La loko estis brakumita de montoj en tri flankoj kaj la kvara estas malfermita. Pro sia kvietta medio ĝi estas rigardata kiel la plej ĉarma loko de la monto. Jŭelu-lernejo ombrita de la densa arbaro antaŭ la kiosko, konstruita de la ŝtato en 976 p. K., estis la plej granda el la kvar famaj lernejoj de Song-dinastio kaj la unika konservita supera lernejo. Oranĝa Insulo estas longa insulo en la rivero Ŝjangĝjang. En ĝia suda ekstremo prosperas oranĝaj arboj kaj salikoj. La impona nova fervoj-stacio, bela Ŝjangĝjang-rivero kaj la arkoponto super la rivero donas al la urbo pli da ĉarmeco.

Estas menciinde, ke la urbo Ĉangŝa estas loko, kie Maŭ Zedong, gvidanto de la ĉina popolo, lernis kaj faris revolucionan aktivadon en siaj junaj jaroj. En la Unua Normala Lernejo de Ĉangŝa, Ĉingŝujtang-distrikto, Domo de Ĉuanŝan-asocio kaj aliaj revolucionaj memorigaj lokoj konserviĝas multaj historiaj objektoj pri

Maŭ Zedong en la junaj jaroj kaj la ĉina revolucio.

Ankaŭ la tieaj brodaĵoj kaj porcelanaĵoj estas fame konataj en la mondo. La Hunan-aj brodaĵoj estas tradiciaj artaĵoj kun historio de pli ol 2 000 jaroj, unu el la kvar famaj brodaĵo-stiloj de Ĉinio (la aliaj tri estas tiuj de Ĝjansu, Gŭangdong kaj Siĉŭan). En la internaciaj foiroj okazintaj en Japanio, Panamio, Usono kaj aliaj lokoj la Hunan-aj brodaĵoj plurfoje estis premiitaj. La brodistinoj lerte brodas diversspecajn bildojn kun ĉin-stilaj pentraĵoj kiel modeloj per pli ol 70 brodmanieroj kaj silkaj fadenoj de pli ol 200 koloroj kun pli ol 500 kolor-nuancoj. En la lastaj jaroj oni sukcese brodis malsamajn bildojn sur ambaŭ flankoj. Ekz. sur unu flanko de la brodaĵo estas aminda blanka katido kaj sur la alia petolas flava hundido. Tiaj brodaĵoj tre plaĉas al eksterlandaj turistoj. Oni povas laŭplaĉe aĉeti broditajn vestojn, kapkusenajn sakojn, tablotukojn, kusenojn k.s. aŭ mendi brodaĵojn.


Hunan-aj porcelanaĵoj kun desegnoj sub la glazuro estas unu el la preferataj aĉetaĵoj de turistoj. Oni unue faras kolorajn bil-

dojn aŭ desegnojn sur nebakitaj pecoj, poste kovras ilin per travidebla glazuro kaj fine bakas ilin en alta temperaturo. La farbo ne bezonas plumbon por faciligi fandiĝon, la produktaĵoj konformas al la higiena normo de la internacia merkato. Turistoj povas priregardi la tutan procedon de la Porcelana Fabriko Ĝjanŝjang kaj aĉeti ĝiajn manĝilaron, kaf-trinkilaron, ĉiutage bezonatajn porcelanaĵojn kaj artismajn porcelanaĵojn, kiuj ĝuas altan reputacion internacie.

Petate de eksterlandaj turismaj grupoj aŭ turistoj, nia turisma servo donas konsilojn por ilia vojaĝo, ekz. viziti lernejojn, hospitalojn kaj kamparon, organizi interkonatiĝon kaj kunsidon kun fakuloj en kultura, arta, sporta, scienca kaj teknika rondoj, organizi ĉasadon, fiŝhokadon, lernadon de la gimnastiko Tajĝjiĉjŭan kaj akupunkturo kaj eĉ mielmonatan vojaĝon.

Turistoj povas loĝi en la hoteloj Ŝjangĝjang aŭ Fujong moderne ekipitaj. La hoteloj servas per ĉina kaj eŭropa gastronomioj, unuaklasaj en nia provinco. Tie oni povas preni Hunan-ajn pladojn, unu el la ok famaj plad-sistemoj de Ĉinio. La pladoj zorgeme preparitaj el delikataj kruadaĵoj estas vere apetitaj.

Ni varme bonvenigas eksterlandajn Esperantajn vizitgrupojn kaj turistojn vojaĝi al Ĉangŝa. La Hunan-a Esperanto-Asocio efiĉe kunlaboras kun la turisma servo de nia urbo, kiu povas doni al la turistoj ankaŭ Esperantajn ĉiĉeronojn. En 1984 ni aranĝis intervidiĝojn por tri Esperantaj vizitgrupoj kun lokaj esperantistoj, kio tre ĝojigis la gastojn. Ni kun granda ĝojo atendas alvenon de pli da eksterlandaj esperantistoj-gastoj.




La Oranğa Insulo

Foto de LJU ĠIGŪO



La hotelo Jongjüan Foto de ĜANG JANĈJI


Fama fiŝ-plado de Ĉangŝa Foto de ĜANG JANĈJI



Aj'üan-kiosko en aŭtuno Foto de FU ĜAŬŜJUN




吳昌碩
庚申秋
楊文修
畫



Cangša Foto de **DAJ ŠJANGHUJ**

Brodaĵo de Hunan Foto de **JANG ŠIJIN**

La fonto Bajhe en la parko Jŭelu Foto de **FU ĜAŬŠJUN**



Tjanĝin, la Tria Granda Urbo de Ĉinio

de ĜENG ĜENGJE



Singang-haveno de Tjanĝin Foto de ĜI ĜU



Strato de Tjanĝin

Foto de LAŬ BAJ



Stando sur strato

Foto de LAŬ BAJ

TJANĜIN, unu el la tri municipoj de Ĉinio, situas en la nordorienta parto de la Nordĉinia Ebenaĵo kaj distancas de Pekino 120 kilometrojn. Ĝi administras kvin guberniojn kaj havas areon de 11 268 kvadrataj kilometroj kaj 7.76 milionojn da loĝantoj.

Tjanĝin bordas Bohaj-maron. En la urbo zigzagas multaj stratoj laŭ rivero.

Post kiam Tjanĝin estis malfermita kiel komerca haveno en 1860, en la urbo unu post alia leviĝis modernaj industrioj. Hodiaŭ, tiu malnova industria bazo disvolviĝis en modernan industriaran urbon kun kompletaj specoj. Ĝi havas grandajn teknikajn fortojn kaj 4 400 fabrikojn de metalurgio, petrolo, kemiindustrio, elektro, konstrumaterialo ktp. Multaj famaj produktaĵoj de la urbo, kiaj tapiŝo kun fabrik-marko Velŝipo, vektorloĝo kun fabrik-marko Orkoko, akordiono kun fabrik-marko Papago, novjaraj pentraĵoj de Jangliŭĉing, koloraj argilaj homfiguroj faritaj de modlisto Ĝang, kajtoj ktp. estas ĉiam laŭdataj de en- kaj eksterlandaj klientoj.

Tjanĝin estas grava kultura kaj scienc-esplora centro de Ĉinio. En la urbo troviĝas 29 altaj lernejoj, pli ol 100 scienc-esploraĵoj kaj projektaj institutoj kaj ĉ. 200 mezgradaj teknikaj lernejoj.


Pro malbonaj geologiaj kondiĉoj oni ne povas konstrui altajn etaĝdomojn en Tjanĝin, tial la domkonstruado devas etendiĝi al la horizonto. En la antaŭurbo, krom multaj domoj en konstruado, estas ankaŭ pli ol 400 000 hektaroj da agroj, kiuj povas liveri ĉiujare al la urbo sufiĉe da legomoj kaj produkti ĉ. 1 500 000 tunojn da rizo, tritiko, milio, sorgo kaj maizo.

Tjanĝin havas multajn favorajn kondiĉojn por disvolvi ekonomian kunlaboron kun aliaj landoj. Ĝi havas multe esperigan grandan havenon kunligantan transportajn sistemojn de fervojoj, ŝoseoj kaj riveroj. Tjanĝin estas riĉa je energia rezervo de petrolo, natura gaso, karbo kaj geotermo. La Dagang-a Petrolkampo en ĝia antaŭurbo jam eksportas parton da petrolo kaj gaso. En la estonteco ekspluati marfundan petrolon kaj akiri petrolajn kemiindustriajn produktaĵojn estos unu el la

Parto de Tjanĝin

Foto de **JU ĜJAGEN**






Bohaj-olekampo investita kaj ekspluatata de Ĉinio kaj alia lando

Foto de ĈEN FUŠENG

ĉefaj punktoj de la ekonomia konstruado de Tjanĝin kaj ekonomia kunlaboro inter Ĉinio kaj aliaj landoj. Nun Ŝingang-haveno de Tjanĝin havas 27 ankrejojn por dekmil-tonelaj ŝipoj kaj ĝia nova kontenera doko, kiu estas la plej granda en Ĉinio, jam estas transdonita al uzado. La longa saloriĉa marbordo de Tjanĝin produktas kvaronon de la totala produktokvanto de salo de Ĉinio. Krome, la urbo estas ankaŭ unu el la ĉefaj produktoj de alkalo kaj kaŭstika sodo.

Tjanĝin havas ebenan marbordon de 130 kilometroj, kun vasta salalkala tero, kaj Hajheriveran bordon de ĉ. 40 kilometroj, kio liveras tre favorajn kondiĉojn por la industrio, trafiko kaj urbokonstruado de Tjanĝin. Post kiam oni sukcese kondukis al Tjanĝin dolĉan akvon el Lŭanherivero en la norda parto de Hebej-provinco, jam mildiĝis nesufiĉa liverado de dolĉa akvo al la urbo. Kaj granda kvanto da malvarmiga akvo, kiun industrio bezonas, estas jam anstataŭigita per marakvo.

En la lastaj jaroj, direktate de la politiko de la ŝtato "malfermi la pordon al la eksterlando kaj vigligi la ekonomion enlande", Tjanĝin enkondukis 350 teknikajn projektojn kaj starigis komercajn rilatojn kun ĉ. 20 000 komercistoj el 140 landoj kaj regionoj. La avangardaj produktaj teknikoj kaj scienca administrado ebligis al nemalmultaj produktaĵoj de Tjanĝin rapide eniri en la internacian merkaton. Ekzemple, la vino kun marko Dinastio, farita de la vina limigita kompanio entreprenata kune de Ĉinio kaj Francio el bonkvalitaj vinberoj de Tjanĝin kaj per avangarda teknologio, havas acidadolĉan guston kaj vinberan aromon. Ĝiaj koloro, gusto kaj klareco estis juĝitaj de mondfamaj vinaj ekspertizistoj kiel la superaj, kaj la vino honore gajnis oran medalon en la Printempa Internacia Foiro de Lepŝiko okazinta en 1984. Tiujare la kompanio produktis 400 000 botelojn da vino, kiuj havis grandan debiton en Hongkong kaj Japanio. Laŭ plano la kompanio pligrandigos sian produktan povon




En la Ĉina-Otsuka Farmacia Limigita Kompanio entreprenata kune de Tjanĝin kaj Japanio Foto de LAŬ BAJ

ĉiujare produkti milionon da boteloj. La Ĉina Otsuka Farmacia Limigita Kompanio entreprenata kune de Tjanĝin kaj Japanio, de majo ĝis oktobro de 1984, produktis pli ol 2 milionojn da boteletoj da injektaĵo. En produktado kaj administrado tiu kompanio rigore observas internaciajn normojn, tiel ke la kvalito de la produktaĵoj atingis la internacian avangardan nivelon. Oni pakis produktaĵojn per polipropilenaĵaj plastaj boteletoj, por ke ili estu pli sekuraj en klinika apliko. Krome, la produktaĵoj de tiu kompanio validas 5 jarojn, pli longe ol la samspecaj produktaĵoj de aliaj fabrikoj. Nun la kompanio jam produktis 5 specojn de injektaĵoj, el kiuj la komponita injektaĵo de laktata natrio kaj glikozo kaj la komponita injektaĵo de laktata natrio kaj sorbitalo estas la plej novaj en Ĉinio. Ĝi produktos serion da elektrolita injektaĵo, kiu mankas al Ĉinio.

La ĉina registaro decidis plue doni al Tjanĝin la rajtojn pri ekzameno kaj sankcio de fremdlandaj investoj, por ke Tjanĝin pli efike utiligu

fremdlandajn kapitalojn. Tjanĝin alprenos jenajn rimedojn:

La Tjanĝin-a magistrato decidis doni al fremdlandaj komercistoj pli favorajn kondiĉojn en ilia investado, kiaj fondo de kune investitaj entreprenoj kaj kunlaboraj entreprenoj, prilaborado de materialoj liveritaj de alilandaj komercistoj, muntado de maŝinoj per maŝinpecoj liveritaj de ili, akcepto de produktaĵo-mendo laŭ specimeno, negoca redono de prunto per produktaĵoj, luado de ekipaĵoj ktp. La Tjanĝin-a magistrato permesas, ke fremdlandaj komercistoj fondu entreprenojn en Tjanĝin sole per sia kapitalo kaj laŭeble donos al ili oportunajn kondiĉojn. Krome, ili povos ricevi ankaŭ favoron redukti aŭ forigi enspezan imposton. La magistrato kuraĝigas la entreprenojn kun fremdlanda kapitalo vendi siajn produktaĵojn en la internacia merkato kaj permesas al ili enlande vendi siajn produktaĵojn, kiuj povas anstataŭi la importajn aŭ estas bezonataj de kaj mankantaj al Ĉinio.



En la kosmetika kompanio administrata kune de Ĉinio kaj Aŭstralio
Foto de LAŬ BAJ


Oni starigos novan ekonomian ekspluatatan regionon en la tria filio de la Tanggu-a Salfarejo en Tanggu-distrikto en Tjanĝin. En tiu regiono la produktaj entreprenoj funkciigataj per kuna investado kaj en kunlaboro aŭ tiuj funkciigataj de fremdlandaj komercistoj mem ĝuos favoron re-

dukti enspezan imposton, kiel en la Ŝenĝen-a Ekonomia Speciala Regiono kaj aliaj. Ankaŭ eksterlandaj komercistoj povas elsendi sian laŭleĝan profiton el Ĉinio senimposte. Laŭ la ĝenerala projekto, tiu ekspluata regiono estos projektita kun Tanggu-distrikto kaj Ŝingang-haveno de Tjanĝin kaj disvolviĝos kune kun ili. Ĝis la fino de la kuranta jarcento, Ŝingang-haveno de Tjanĝin estos konstruita en grandan modernan havenon kun avangardaj ekipaĵoj, granda kapablo de ŝarĝo kaj malŝarĝo kaj perfekta servo. La ekspluata regiono tiam havos miliardojn da ĵuanoj da produktovaloro kaj sistemojn de scienca esploro, eduko, kuraco, higieno kaj komerca servo. Ankaŭ Tanggu fariĝos moderna havenurbo kun oportuna trafiko kaj bela medio, kie la socio estos stabila kaj la popolo riĉa.

Nun, por pli rapide krei bonajn kondiĉojn por fremdlandaj investantoj, la Tjanĝin-a magistrato faras traktaton kun ili por rapide konstrui grandajn hotelojn, domegojn kun apartamentoj, internaciajn komercan kaj eksponan centrojn, plibonigi la komunikajn ekipaĵojn ktp. Ankaŭ aŭtovojo interligonta Pekinon kaj Tjanĝin estas en konstruado per kuna investado.

Petrolistoj de Ĉinio kaj alia lando laboras sur la puto-bora platformo Bohaj n-ro 8.

Foto de ĈEN FUSENG



AŬTUNA REMEMORO

(MIKRONOVELO)

POST paraliziĝo de la gamboj, mia humoro fariĝis furioza kaj kaprica. Foje mi subite frakasis la fenestran vitron antaŭ mi, kiam mi vidis sovaĝanserojn flugantaj al la nordo; alifoje, aŭskultante la dolĉan voĉon de kantistino en la radioricevilo, mi forĵetis kontraŭ la muron ĉion, kion mia mano hazarde kaptis. En tiaj okazoj, mia patrino senbrue foriris, sin kaŝis for de miaj okuloj kaj subaŭskultis pri mi. Kiam ĉio silentiĝis, ŝi reaperis antaŭ mi kun ruĝaj okuloj kaj min rigardadis. “Oni diras, ke en la parko Bejhaj prosperas floroj, ĉu mi veturigus vin tien?” ofte proponis ŝi. Ŝi ŝatis florojn, sed post kiam mi paraliziĝis, ĉiuj ŝiaj floroj velkis. “Ne, mi ne volas! mi kriegis pugnante la gambojn, “eĉ vivi mi ne volas!” Ŝi sin ĵetis al mi, kaptis miajn manojn kaj konsolis min retenante ploron: “Tamen ni devas vivi, ni vivu bone. . . Mi vin akompanos.”

Sed dum longa tempo mi ne sciis, ke grave serioziĝis ŝia malsano. Poste mia fratino diris al mi, ke mia patrino ofte maldormis tutan nokton pro hepata doloro.

Tiun tagon, mi denove restis sola en la ĉambro kaj rigardis la susuran faladon de arbofolioj. La patrino eniris kaj staris antaŭ la fenestron. “Floras krizantemoj en la parko Bejhaj, ĉu mi veturigus vin tien per puŝĉaro?” Petego legeblis sur ŝia velka vizaĝo. “Kiam?” “Ĉu morgaŭ, se vi volas?” “Do morgaŭ.” Mia konsento tiel ĝojigis ŝin, ke ŝi jen sidiĝis, jen stariĝis. Ŝi murmure ripetis: “Mi tuj faros preparon.”

“Ej, la parko estas tre proksime, kaj kia preparo necesas!” Ŝi ekridetis, sidiĝis apud min kaj eksplikis sian planon: “Reveninte de la krizantemoj, ni iru al la butikoj, kie oni vendas kukon kiun vi tre ŝatis en la infaneco. Ĉu vi memoras tiun viziton al la parko? Vi insistis, ke la amentoj de popoloj estas vermoj, kaj ekkuris por treti. . .” Subite ŝi ĉesigis la parolon, ĉar ĉe la vortoj “kuri”, “treti” k.s. ŝi estis pli sentema ol mi. Ŝi foriris senbrue.

Ŝi eliris kaj ne revenis plu.

Kiam la najbaroj portis ŝin sur ĉaron, ŝi ankoraŭ sputadis sango. Mi ne atendis, ke tiel grave malsaniĝis mia patrino. Rigardante la forirantan ĉaron, mi ne

atendis ankaŭ, ke ŝi forlasos min por eterne.

Kiam junulo de najbara familio portis min surdorse al la hospitalo, mi vidis mian patrinon malfacile spiranta. Oni diris al mi, ke ŝiaj lastaj vortoj antaŭ la sveno estis: “Mia paralizita filo, mia tro juna filino. . .”

Denove estas aŭtuno. Mia fratino veturigas min per puŝĉaro en la parkon Bejhaj por rigardi krizantemojn. La graciaj flavaj floroj, la noblaj neĝblankaj floroj, la fervoraj kaj edifaj purpuraj floroj. . . ĉiuj plene disvolviĝas en la aŭtuna vento. Mi komprenas la lastajn vortojn de la patrino, ankaŭ la fratino komprenas. Ni devas vivi bone.





*Fanfaro de
kamparanoj*





Fotoj de ŬANG ENPU



En la printempo de 1981 fondiĝis kamparana fanfaro de Deŝeng-subdistrikto, Ĝinŝjan-gubernio, Ljaŭning-provinco. Post kvar jaroj ĝi fariĝis kompare perfekta postlabora muzikista trupo kun latunaj instrumentoj, lignaj blov-instrumentoj, soldataj tamburoj kaj perkut-instrumentoj. Ĝi konsistas el 40 muzikamantoj. Ili diligente sin ekzercas kaj ricevas helpon de profesiaj muzikistoj de lokaj kulturaj organizoj kaj dank' al tio pli kaj pli altiĝis ilia ludarto. Dum tiuj jaroj la fanfaro faris prezentadon ne nur en sia subdistrikto, sed ankaŭ senpage en najbaraj subdistriktoj. Ĉiujare ĝi ludis pli ol 60 fojojn kaj estis varme bonvenigata de kamparanoj.

CHUN-CHAN YEH

MONTARA VILAĜO

El la angla tradukis **William Auld**

Serio Oriento-Okcidento n-ro 21
sub aŭspicioj de Universala Esperanto-Asocio

Formato: 148 × 210 mm.


Prezo: £3,85 US\$ 7,80

Numero: 10-Es-1882S



Eldonita de ĈINA
ESPERANTO-ELDONEJO

Mendu ĉe: Libroservo de UEA
Perantoj de EPC

aŭ Internacia Libro-Komerca Kompanio de Ĉinio
(GUOJI SHUDIAN), Esperanta Sekcio,
P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio



Karikaturoj



KURANTAJ AFEROJ

PLANO POR DISVOLVI ELEKTRONIKAN KAJ INFORMAN INDUSTRIOJN ELLABORITA

Ĉinio jam ellaboris planon por disvolvi elektronikan kaj informan industriojn. En la periodo de la Sepa Kvinjara Plano (1986-1990) elektronika industrio de Ĉinio estas akcelata per senprecedenca rapido por kvarobligi la totalan produktovaloron de industrio kaj agrikulturo. Integraj cirkvitoj, komputeroj, telekomunikoj kaj softvaroj atingos relative avangardan internacian nivelon.

Por plenumi la planon, Ĉinio asignos specialan monsumon por subteni la entreprenojn, instituciojn, sciencesplorajn institutojn kaj superajn lernejojn donantajn relative grandan ekonomian efikon kaj havantajn avangardajn teknikojn, kaj ankaŭ por plenumi la ĉefajn taskojn de la ŝtato, kiuj ludas decidan rolon en disvolvo de elektronika kaj informa industrioj, en la formo de publika anonco pri kontraktopropono kaj kolektado de mono. La ŝtato praktikos konvenajn protektajn politikojn por

Verkistoj paŭzas dum la kongreso.



subteni la disvolviĝon de la enlande avangardaj akcepteblaj elektronikaj teknikoj kaj produktaĵoj pere de ekonomiaj leĝoj. La fremdlandaj kompanioj, kiuj volas kunlabori kun Ĉinio en disvolvo de novaj teknikoj, ĝuos privilegiojn laŭ malsamaj kondiĉoj.

REKORDA JARO DE EKSTERA KOMERCO


La ekstera komerco de Ĉinio kreis novan rekordon en 1984. La totala valoro de importoj kaj eksportoj atingis 49 970 milionojn da usonaj dolaroj, kun kresko de 22.7 procentoj kompare kun 1983. La malfavora saldo estis 1 100 milionoj da usonaj dolaroj.

Multe kreskis avangardaj teknikoj, kompletaj ekipaĵoj, aŭtoj kaj ŝtaloj en la importoj.

En la lasta jaro Ĉinio tenis komercajn rilatojn kun 170 landoj kaj regionoj kaj enkondukis eksterlandajn kapitalojn per pli granda rapido. En la jaro kontraktiĝis 4 800 milionoj da usonaj dolaroj.

ĈINŜAN-A NUKLE-ENERGIA CENTRALO

Komenciĝis la konstruado de ĉefa domo de la Ĉinŝan-a Nukle-energia Centralo, la unua projek-



Nova telekomunika aparato

tita kaj konstruata de Ĉinio mem. La centralo situas antaŭ la monto Ĉinŝan kaj rigardas la maron, en Hajjan-gubernio, Ĝeĝjang-provinco.

La centralo, kun generatora kapacito de 300 000 kilovattoj, estas projektita per sukcesaj teknikoj en kaj eksterlandaj. Ĝia sekureco jam atingis la mondan avangardan nivelon de postaj 70-aj jaroj kaj unuaj 80-aj jaroj.

LA KVARA KONGRESO DE LA ĈINA VERKISTA ASOCIO

La Ĉina Verkista Asocio okazis kvaran kongreson de la 29-a de decembro, 1984, ĝis la 5-a de januaro, ĉijare en Pekino. La kongreso aprobis novan statuton de la asocio kaj la nomlistojn de la konsilantaro kaj konsultiĝa komitato.

Hu Ĉjili, membro de la Sekretariejo de la Centra Komitato de KPĈ, diris, ke la Partio, registaro, literaturaj kaj artaj rondoj kaj la tuta socio ĉiuj devas firme garanti liberon al la verkado de la verkistoj. La kongreso alvokas, ke ili verku novajn kaj bonajn verkojn en la nova periodo por ke la ĉina

moderna literaturo fiere marŝu en la fronto de la monda literaturo.

FONDIGO DE INSTRUISTA TAGO EN ĈINIO

La 21-an de januaro la Konstanta Komitato de la Ĉina Tutlanda Popola Kongreso unuanime aprobis rezolucion pri determino de instruista tago proponita de Ĝaŭ Zijang, ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro, kaj difinis la 10-an de septembro kiel feston de la ĉinaj instruistoj. La decido celis pliaŝe altigi la politikan kaj socian pozicion de instruistoj por ke la profesio de instruisto fariĝu unu el la plej respektataj kaj enviindaj profesioj de Ĉinio kaj formiĝu socia moro respekti instruistojn, sciojn kaj talentulojn.

SOJFABAJ PLANTOJ KULTURITAJ EL FOLIOJ

Ĉinio sukcesis en kulturado de plantoj el sojfabaj folioj, kio estas la unua fojo en la mondo. Teorie, nova planto povas esti elkulturita el ĉiu ajn planta ĉelo per arta metodo. Sed estas tre malfacile kulturiti plantojn el radikoj, folioj kaj branĉoj de sojfaboj. Sciencistoj de la Agronomia Instituto de la

Gang Sjaŭdong en flughaveno post la konkurso




urbo Ĝjilin komencis kulturiti foliojn disde la sojfabaj plantoj en provtubo en 1982, kaj sukcese elkulturis ses plantojn post dujara klopodo. Nun du plantoj jam floris kaj fruktis kaj donis duageneraciajn semojn dank' al la kampa

eksperimentado. Enlandaj fakuloj opinias, ke kulturiti sojfabajn plantojn el folioj estas grava scienca frukto kun ekonomia valoro kaj malfermas vastan perspektivon por rapidigi la kulturadon de bonaj specioj de sojfabo kaj venki iujn



Pikniko de eksterlandaj turistoj, kiuj partoprenas en fiŝokado

PINETO



Estis granda arbaro, en kiu nerimarkite elkreskis pineto, tre juna kaj malalta. Vidu, eĉ la apuda herbo estis pli alta ol ĝi. La pineto pensis en si: "Ho, interese! Kio troviĝas post la herbo?" Ĉiutage ĝi rigardis, pensis kaj deziris pli rapide kreski! Pasis unu, du. . . monatoj. Ĝi fine kreskis pli alte.

Nun ĝi jam povis vidi post si kelkajn leontodojn kaj fungojn. Pli malproksimen ĝi rigardis kaj svingadis sin de ĝojo. Vere belaj estis tiuj buntaj floroj. Ĝin ĉirkaŭis altaj kaj dikaj arboj. Super ili estis la blua ĉielo. Tamen, la pineto vidis nur strion da bluaĵo. Tion vidinte, ĝi tre ĝojis, tamen ĝi ne tute kontentiĝis.

Same kiel antaŭe ĝi rigardis, pensis kaj deziris kreski pli alte!

Pasis unu, du. . . jaroj. Ju pli alta ĝi fariĝis, des pli vasta fariĝis la ĉielo.

Tion rimarkinte, la pineto kreskis ankoraŭ pli rapide.

Nun la pineto vidis, ke post la arbaro estas alia arbaro. Pli malproksime, estas aliaj arbaroj. . . Sed, kio do troviĝas post tiuj arbaroj?

Tion pensante, la pineto kreskis senĉese.

Nun, ĝi jam fariĝis la plej alta arbo en tiu arbaro. Sed ĝi kreskos plu kaj neniam ĉesos kreski. La pineto bone scias, ke ĝi povos rigardi pli malproksimen nur se ĝi kreskos pli alte.

malfacile solveblajn problemojn en kutima kulturado.

12 MILIONOJ DA TURISTOJ VIZITIS ĈINION

En 1984 12 milionoj da turistoj vizitis Ĉinion. La nombro estis 30.4 procentojn pli granda ol tiu en 1983. Krom Pekino, Ŝanhajo, Kantono kaj Guĵlin, ilin pli kaj pli interesas ankaŭ la malfermitaj urboj kaj specialaj regionoj kiaj Ŝenĝen, Ĝuhaj, Daljan, Ĉingdaŭ, Ŝjamen kaj Fuĝoŭ.

ĈINA UNUA MONDĈAMPIONO DE SURFOTABULA VELADO

Ĝang Ŝjaŭdong, 20-jara ĉina sportistino, gajnis ĉampionecojn de longdistanca virina surfotabula velado kaj virina triangula konkurso ĉe la 11-a Monda Ĉampiona Konkurso de Surfotabula Velado okazigita en decembro, 1984 en Aŭstralio. Ŝi estas la unua ĉino,

kiu gajnis ĉampionecon en la internaciaj konkursoj de surfotabula velado.

ĈINAJ AKROBATOJ GAJNIS ORAJN MEDALOJN EN MONDA CIRKA FESTIVALO

De la 25-a ĝis la 29-a de januaro ĉijare okazis la oka pariza "Monda Cirka Festivalo de Morgaŭ". En la festivalo ĉ. 200 akrobatoj el Ĉinio, Francio, Rumanio, Jugoslavio, Sovetunio, Usono, Svisio, Hispanio kaj aliaj 14 landoj prezentis belajn programerojn kaj faris intensan konkurson.

Ludoj "Leona Danco" kaj "Pagodo el Bovloj" de ĉinaj akrobatoj gajnis orajn medalojn.

La "Leona Danco" gajnis la unuan oran medalon — "medalon de Prezidanto de Franca Respubliko" kaj la "Pagodo el Bovloj"

la duan oran medalon — "medalon de Franca Kultura Ministerio". Estas la kvara fojo por la ĉinaj akrobatoj partopreni en tiu ĉi monda festivalo kaj ankaŭ la kvara fojo sinsekve gajni la plej altan premion de la festivalo.

ĈINAJ JUNAJ GEDANCISTOJ GAJNIS PREMIOJN EN LAŬZANA BALETA KONKURSO

Li Jing kaj Ŝju Gang, studentoj de la Baleta Instituto de Pekino, gajnis la unuan kaj duan premiojn de la Johnson-Fonduso ĉe la 13-a Laŭzana Internacia Baleta Konkurso por Junaj Dancistoj.

En la finalo Li Jing prezentis klasikan variacion de «La Korsaro» kaj liberan variacion de «La Mirakla Birdo», dum Ŝju Gang prezentis klasikan variacion de «Gisselle» kaj liberan variacion de «Sur Songhŭa-rivero».



Nordorienta tigro

ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO

de GONG TU

RARAJ


EN Ĉinio ekzistas multaj specoj de sovaĝaj animaloj. Laŭ statistiko, estas 1 166 specoj de konataj birdoj, kiuj konsistigas 13.4% de la totala nombro de la birdoj en la mondo, pli ol 420 specoj de bestoj, kiuj konsistigas ĉ. 11% de la totala nombro de la bestoj en la mondo, ĉ. 200 specoj de amfibioj kaj 300 specoj de rampuloj.

Sovaĝaj animaloj povas ne nur esti montrataj en zoo, sed ankaŭ liveri grandan kvanton da lano, plumoj, feloj, viando, graso kaj valoraj drogoj, kaj iuj el ili estas uzataj en scienca esploro kaj medicina eksperimento. Ekskluzive aŭ ĉefe donas felojn pli ol 70 specoj de bestoj, kiel ĉinĉilo, marmoto, musteloj (*Mustela sibirica*

kaj *Mustela altaica*) kaj linko en norda Ĉinio, sciuro, rizomiso (*Rhizomys sinensis*), mustelo kaj maskita cibeto en suda Ĉinio kaj vulpo, prociono, melo, leopardo, kato kaj leporo en la tuta lando. La plej raraj estas zibelo kaj lutro. Ekskluzive aŭ ĉefe donas viandon sovaĝa poefago, sovaĝa azeno, apro, kapreolo, mongola gazelo, kapro, ĉamo, ovio, gnuo, rangifero, elafoduso (*Elaphodus cephalophus*) ktp. Krome iliaj feloj estas uzataj por fari ledon kaj iliaj lanoj por ŝpini kaj teksu. Por fari drogojn oni utiligas unu aŭ plurajn partojn de la korpo de iuj bestoj, kiel makulcervo, ruĝa cervo, bruna cervo, alko, blanklipa cervo, antilopo, moskulo, tigo, urso ktp. Oni faras valorajn drogojn el cervaj junkorno,

cervoembrio, vircerva seksilo, antilopa korno, mosko, tigrosto, tigrograso, tigrosango, ursograso, ursogalo ktp. Iuj sovaĝaj bestoj estas valoraj por fari ledon, manĝaĵon kaj drogojn, kaj des pli por scienca esplorado kaj elmetado en zoo. Ili estas gibono, orhara simio, makako, loriso, granda kaj malgranda pandoj, sovaĝa ĉevalo, guanako, sovaĝa bovo, sovaĝa elefanto, nordorienta tigo ktp.

En la granda nombro da sovaĝaj animaloj multaj vivas nur en Ĉinio kaj iuj estas raraj kaj fame konataj en la mondo, ekz. ne nur granda pando, orhara simio, aligato kaj ruĝverta gruo, kiujn nia gazeto konigis, sed ankaŭ nordorienta tigo, blanknaĝila delfeno, alko, blanklipa cervo, blanka urso kaj amfiokso.



Blanklipaj cervoj

ANIMALOJ DE ĈINIO

La nordorientaj tigroj, kiuj vivas en la Malgranda Ŝing'an-montaro de Hejlongĝjang-provinco kaj Ĉangbaj-montaro de Ĝjilin-provinco, ĉiu pezas ĉ. 200 kg., kun longeco de 2 m. La plej granda el ili pezas 320 kg., kun longeco de 4 m. Tia tigro estas hele flava kaj havas sur la frunto striojn similajn al la ĉina ideogramo “王” signifanta reĝon. Ĝi estas fama pro siaj granda korpo, belaj longaj haroj, mirinda forto kaj furiozeco.

La blanknaĝila delfeno estas akva mamulo kaj apartenas al la klaso de dolĉakvaj delfenoj, la plej antikva kaj plej primitiva en la familio de la nunaj balnedoj, kaj pro tio ricevis la nomon viva fosilio de la mondo. La blankna-

ĝila delfeno, longa je 2 — 2.5 m., blu-griza dorse kaj blanka ventre, havas longan buŝon kun ĉ. 130 dentoj. Tiaj delfenoj nutras sin per fiŝoj kaj vivas en Dongting-lago, la meza kaj malsupra Jangzi-rivero kaj Ĉjantang-rivero.

La alko kaj blanklipa cervo estas propraj al Ĉinio. La alko estas groteska, kun korpo simila al tiu de azeno, hufoj al tiuj de bovo, kornoj al tiuj de cervo kaj kapo al tiu de ĉevalo, tial en Ĉinio oni nomas ĝin monstro. La blanklipaj cervoj en malgranda nombro vivas ĉefe en la regiono de Ĉinghaj kaj Tibeto. Ili havas blankajn harojn ĉirkaŭ la buŝo kaj pro tio ricevis la nomon.

La vila blanka urso prenas sovaĝajn fruktojn kaj bambuidojn

kiel sian manĝaĵon. Ĝi havas blankajn harojn sur si kaj ruĝajn supran lipon, nazpinton kaj okulojn. Ĝi kun longa kolo, mallonga vosto kaj starigitaj oreloj, estas obeema kaj povas iri per siaj postaj piedoj. Ĝi estas tre rara ursospeco.

La amfiokso, longa je 4-5 cm., havas platan kaj kristale ruĝan korpon kun pintaj kapo kaj vosto. Ĝi vivas ĉe la marbordoj de Ŝjamen, Ĉingdaŭ kaj Jantaj. Ĝi apartenas al cefalopodoj. Krom ĥordo tra la tuta korpo, ĝi havas nek kranion nek vertebron. Ĝi estas transiranto de senvertebruloj al vertebruloj kaj rigardata de la mondo kiel la prapatro de la fiŝoj.

BAJI-URBETO, PERLO SUR LA ALTEBENAĴO


de SUN MINGĜEN

LA nova urbeto Baji, famkonata kiel perlo sur la altebenaĵo, situas en la gubernio Njingĉi, kiu estas 400 kilometrojn oriente de Lhasa, la ĉefurbo de la Tibeta Aŭtonoma Regiono.

La urbeton trairas Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo (de Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉŭan-provinco, ĝis Lhasa). La urbeto estas 2 900 metrojn super la mara nivelo, ĝi estas bela, la klimato humida kaj varmeta, kaj la pejzaĝo estas tute malsama ol tiu de Lhasa. Sur la altaj montoj ĉirkaŭ ĝi kreskas primitivaj arbaroj kun pinoj kaj cipresoj ĉielskrapantaj kaj dikaj je homa ĉirkaŭpreno. Inter la

Lanmatracoj kun ĵakardaj desegnoj produktitaj de la Njingĉi-a Lan-tekstila Fabriko

Foto de MA GINGĈIU



arboj prosperas sennombraj arbedoj, lianoj, herboj, belaj floroj, kvazaŭ ĉarma ekranostarigita ĉirkaŭ la urbeto. La klara rivero Nijang trafluas la urbeton orienten, kiel verda rubando. Super la rivero etendiĝas pli-ol-400-metra betona ponto, kiu interligas la du partojn de la urbeto. Ambaŭborde de la rivero sterniĝas verda herbejo. Ja sur tiu verda tapiŝo kuŝas la urbeto.

Baji estas unu el la plej junaj urbetoj en Tibeto. Ĝi havas nur dudek jarojn. Antaŭ 1965 tie estis dezerto, plena de bulŝtonoj kaj sovaĝaj herboj. Anstataŭ fiksluantoj familioj tie estis nur kelke da tendoj de paŝtistoj. En 1965 tien venis pioniroj el diversaj lokoj de Tibeto kaj landinterno, kaj komenciĝis grandskala konstruado. De tiam aperis vicoj post vicoj da etaĝdomoj, fabrikoj, magazenoj, hospitaloj kaj lernejoj kaj ekregis plena vicleco sur la dezerto.

La konstruantoj de la tibeta kaj hana naciecoj konstruis belan urbon per diligenta laboro. La nuna urbeto jam fariĝis nova centro de industrio, trafiko kaj kulturo de la orienta parto de Tibeto. La urbaj kvartaloj kovras areon de 5 kvadrataj kilometroj, kun ĉ. 13 000 loĝantoj, inter kiuj 6 000 estas laboristoj, instruistoj, kuracistoj, komizoj, kelneroj kaj aliaj. En la urbeto estas la Njingĉi-a Lan-tekstila Fabriko, Tibeta Alumeta Fabriko, Baji-a

Elektrejo, Arbara Kompanio, Konstrua Kompanio, Aŭto-transporta Trupo, Ŝoseo-flega Trupo kaj aliaj. Tie interligiĝas al Siĉŭan-Tibeta Ŝoseo kaj alia ŝoseo kondukanta al la regiono Ŝannan de Tibeto. Ĉiutage tien trapasas centoj da aŭtoj. Ĝi jam fariĝis centro de trafiko oriente de Lhasa.

La Njingĉi-a Lan-tekstila Fabriko estas la plej granda lan-tekstila entrepreno en Tibeto, kies ekipaĵoj kaj unuaj laboristoj venis de Ŝanhajo, la plej granda industria urbo de Ĉinio. Tibeto estas unu el la kvin grandaj paŝtejoj de Ĉinio. Tie abundas brutaj produktaĵoj. Sed, en la pasinteco la kamparanoj kaj paŝtistoj manfaris per ŝaflano maldelikatajn drapon, felton k.s. Por ŝanĝi la postĝintecon de la tibeta industrio, en 1966 la ŝtato decidis transloki lan-tekstilan fabrikon de Ŝanhajo en Tibeton. Pli ol 600 ŝanhajaj laboristoj venis al la urbeto tiam malpli prospera. Kune kun nove varbitaj 100 tibetanaj laboristoj ili konstruis fabrikdomojn sur la riverbordo, provizis ilin per maŝinoj kaj produktis tiujare lanfadenon kaj lanteksajon. Post multjara konstruado kaj teknika renovigo nun la fabriko jam fariĝis moderna entrepreno kun kompare avangardaj ekipaĵoj. La fabriko okupas areon de 240 000 kvadrataj metroj kaj havas 1 370 laboristojn, inter kiuj 62% estas tibetanoj.

Ĝiaj ĉefaj produktaĵoj estas lanŝpinitaĵoj, diversspecaj lanaj fadenoj, drapoj, feltoj kaj lanmatracoj kun ĵakardaj desegnoj. Ĝia jara produktovaloro superis 13 milionojn da ĵuanoj (ĉ. 2.8 ĵuanoj egalas al unu usona dolaro). Ĝiaj produktaĵoj vendiĝas en Tibeto, kaj aliaj kvin provincoj kaj aŭtonomaj regionoj. Ĝia lanŝpinitaĵo por tapiŝoj eksportiĝas jam de multaj jaroj kaj estas tre bonvenaj al eksterlandaj komercistoj.

Dum la pasintaj 20 jaroj la fabriko elkulturis grandan nombron da tibetaj laboristoj, oficistoj kaj teknikistoj. En la komenco tempo post la fondiĝo de la fabriko la tibetaj laboristoj konsistigis ĉ. kvinonon de la tuta laboristaro. Ili povis fari nur helpajn laborojn. Kaj nun la ĉefa laboro en la produktado estas plenumata de tibetanoj. Ili jam fariĝis ĉefa forto de la fabriko kaj lerte manipulas diversajn maŝinojn. Dank' al siaj diligentaj lernado kaj praktikado, multaj jam fariĝis elito en la tekniko. La 35-jara tibetano Dudeng Cijen estas unu el la plej fruaj laboristoj de la fabriko, kiu venis de kamparo proksime de Njingĉi en 1966. Unue li zorgis pri teksmaŝinoj kaj poste lernis maŝin-ripardon. Dank' al helpo de hanaj teknikistoj li progresis tre rapide. En 1979 li funkciis kiel vicestro de la instalaĵa sekcio kaj en 1981 kiel ĝia estro. En 1983 li estis titolita kiel asista inĝeniero. Li kun aliaj kvin laborantoj de la sekcio bone prizorgas la 240 maŝinojn de la fabriko. La 27-jara Pubu Zūoma, kvankam ŝi aspektas kiel juna knabino, tamen fariĝis vicestro de la sekcio de produkta tekniko jam antaŭ kvin jaroj kaj respondecas pri projektado de produktaĵoj. En 1972, kiam ŝi komencis labori en la teksta laborejo de la fabriko, ŝi jam



Studentinoj de la Tibeta Agromonia kaj Brutobreda Instituto

Foto de GU ŜOUKANG


montris sian lertecon kaj inteligentecon. La fabriko sendis ŝin al la Tjanĝin-a Tekstila Instituto kaj tie ŝi lernis kvar jarojn. Nelonge post sia reveno al la fabriko ŝi prenis sur sin la taskon respondi pri tekniko. En 1984 ŝi projektis naŭ novajn specojn de produktaĵoj kaj per tio faris kontribuon al renovigo de la produktaĵoj de la fabriko. Nemalmultaj tibetaj laboristoj kaj oficistoj estas promociitaj al diversnivelaĵaj gvidaj oficoj de la fabriko, ekz. vicfabrikestro, estro kaj vicestro de laborejo, aŭ respondeculo de sekcio.

La ŝanĝiĝo en la konsisto de laboristaro kaj oficistaro en la fabriko spegulas tiun de la tuta Tibeto.

Kun disvolviĝo de la industrio kaj trafiko kaj senĉesa plivastigo de la urboskalo, paŝon post paŝo multiĝas komercado kaj publikaj servoj kaj la urbeto prosperis tagon post tago. Nun en la urbeto estas magazeno, almanĝaĵvendejoj, fridigejoj, banko, poŝtofiĉejo,

librejo Ŝinhŭa, restoracioj, banejoj, fotoservo kaj aliaj. En la lastaj du jaroj aperis tie pli ol 40 malgrandaj manĝejoj, butikoj kaj riparejoj entreprenataj de kolektivo kaj individuo. Tio multe faciligas la manĝadon kaj aĉetadon. En la urbetocentro nove inaŭguriĝis foiro, kie kamparanoj kaj paŝtistoj vendas siajn pomojn, persikojn, juglandojn, freŝajn legomojn, bovaĵon kaj ŝafaĵon, buteron, lakto-rekrementon k. a. En la foiro svarmis homoj kaj aŭdiĝis senĉesa marĉandado. Ĉe la urbomezo kaj en la fabriko staras po unu halo, ĉiu kun pli ol mil sidlokoj. Ĉiuvespere tie prezentiĝas filmoj aŭ amuzaj programeroj, kaj la laboristoj kaj oficistoj tie sin distras post laboro.

La urbeto Baji estas ankaŭ grava kultura centro de la orienta parto de Tibeto. Tie estas la Agromonia kaj Brutobreda Instituto de Tibeto, unu el la tri altaj lernejoj en Tibeto. Krome, estas ankaŭ la Baji-a Fizikkultura Ler-



Tibet-naciecaj kirurgoj de la Baji-a Popola Hospitalo studas kuracarton.

Foto de MA ĜINGĈIŬ

nejo, du mezlernejoj kaj kvin elementaj lernejoj, kun sume pli ol 2 200 lernantoj. La instituto estas la unika alta lernejo de la tuta Tibeto, kiu ekskluzive kultur-tek- nistikojn de agrikulturo kaj brutobredado kaj havas kvar fakultatojn: brutobreda kaj veter- rinara, agronomia, forstokul- tura, agrikultur-maŝina kaj hi- droelektra fakultatoj, kiuj estas provizitaj per kompare per- fektaj instrumentoj por instruado. En la instituto estas ankaŭ kul- tivejo, paŝtejo, fruktoĝardeno, arbidejo, meteostacio kaj maŝin- prilaborejo destinitaj por prakti- ka lernado. Nun en la instituto lernas pli ol 280 homoj, kies plej- parto estas tibetanoj kaj alia parto oficistoj de agrikulturaj kaj bru- tobredaj regionoj, kiuj perfekti- gas tie siajn sciojn. En la insti- tuto, krom lerni la teknikon kaj teorion, ili faras ankaŭ praktika- don kaj sciencajn eksperimentojn en la kultivejo kaj paŝtejo. Di- plomite, ili fariĝas teknikistoj, kiuj posedas la koncernan teorion kaj samtempe lernas en praktika manipulado. Post sia fondiĝo en


1974 la instituto jam elkulturis 1 000 teknikistojn, kiuj ludas ĉe- fan rolon en agrikulturo kaj bru- tobredado en diversaj lokoj de Tibeto. La Baji-a Fizikkultura Lernejo elkulturis centojn da ins- truistoj por elementaj kaj mezaj lernejoj de la tuta aŭtonoma re-

giono, kaj ankaŭ elstarajn spor- tistojn.

La Baji-a Popola Hospitalo kun bonaj ekipaĵoj kaj eminentaj tek- nikaj fortoj okupas la duan lokon en la regiono. Ĝi havas 109 la- borantojn, 200 malsanulajn litojn kaj povas fari operaciojn de la kranio kaj koro. La hospitalo kuracas ne nur la loĝantojn de la urbeto, sed ankaŭ la kampara- nojn kaj paŝtistojn de la najbaraj gubernioj.


Kun disvolviĝo de la ekonomia kaj kultura aferoj en la lastaj jaroj, la fizionomio de la urbeto ŝanĝiĝis tagon post tago. Nun regas plena vigeleco en la urbo. La Ŝtata Konsilantaro sankciis starigon de la Njingĉi-a Subregio- no, kies registaro situos en la urbeto. Nun jam komenciĝis grandskala urbokonstruado. Es- tas antaŭvideble, ke en la prok- sima estonteco pli beligiĝos kaj prosperiĝos la urbeto Baji. La "perlo sur la altebenaĵo" radios ankoraŭ pli brile sur la tegmento de la mondo.

La Tibeta Agrohomia kaj Brutobreda Instituto




TIBETO HIERAŬ KAJ HODIAŬ (5)

*Primitiva arbaro en
Njingĉi*
Foto de LIŬ TJEŜENG



Baji-urbeto Foto de GU ŜOUKANG





Fruktoĝardeno en Njingĉi Foto de **GU ŜOUKANG**

Antikva saliko ĉe la rivero Nijang en Njingĉi
Foto de **LIŬ ĈENGHANG**





Instruisto de la Tibeta Agronomia kaj Brutobreda Instituto gvidas sian studentinon en observado de vegetaĵaj ĉeloj. Foto de GU ŜOUKANG

Tibet- kaj han-naciecaj laboristinoj de la Njingĉi-a Lan-tekstila Fabriko interŝanĝas spertojn. Foto de GU ŜOUKANG



PLEJ ANTIKVAJ ODOJ “ĜIŬ GE” SURSCENIGITAJ

de LI PING

Fotoj de SEN ĈEN



Virino de Ŝjangŝuj sopiras al la dio de la akvo.



Amkanto de la dio de la akvo



Laŭmora danco de kamparanoj por peti pluvon

LA Uhan-a Kanta kaj Danca Ensemblo adaptis al granda kantodanca dramo la famajn odojn "Ĝiŭ Ge" verkitajn de la granda ĉina patriota poeto Ĉju Jŭan (340 a. K. — 278 a.K.) kaj prezentis ilin sur la ĉina scenejo. Tio faris sensacion en Ĉinio.

"Ĝiŭ Ge" kun historio de pli ol 2 300 jaroj estas la plej antikvaj odoj muzikigitaj por danco. Ili, senmorta verko kreita de la poeto surbaze de popolaj kultaj kantoj, kun vervo priskribis, kiel la antikva popolo strebis al feliĉo kaj amo, funebris pro herooj mortintaj en batalo kaj preĝis por riĉiĝo kaj potenciĝo de la nacio.

La kantodanca dramo "Ĝiŭ Ge" prezentis al la rigardantoj buntajn antikvajn ĝenrojn: Pompan kultadon, laŭmoran dancon por peti pluvon kaj laŭdi ĉielarkon, fantazian belan kaj sentimentaln nimfon, junajn geamantojn tage kaj nokte renkontiĝantajn en montaro kaj arbaro, maskobalon por forpeli epidemion. . .

La dramo havas ne nur belajn lirikajn dancojn esprimantajn kortuŝan am-aferon, sed ankaŭ emociajn epizodojn. Ekzemple, en la deka sceno "La Odo al la Viktimoj" oni reliefigis militan

atmosferon per densaj nuboj kaj obtuza kaj rapida tamburado. En akompano de elegio ŝtatoficistoj kaj plebanoj de la suda regno Ĉu, en funebraj vestoj kaj kun funebraj flagoj en la manoj, trairis malrapide la scenejon kaj la edzino de iu viktimo dancis indigne. Post la dancado ŝi etendis la brakojn al la ĉielo, ke oni faru venĝon. Tiam aŭdiĝis la laŭta "Kanto de Bravuloj" kaj reaperis batalo sur la scenejo. Fine la dramo kulminis per la kvarobla ĥoro:

Eternas spirite la viktimoj


Kaj heroe famiĝas la animoj.

Maskobalo por forpeli epidemion



Sceno el "La Odo al la Viktimoj"

VIZITO AL HORGOS — KOMERCA HAVENO ĈE LA ĈINA-SOVETIA LANDLIMO



Ĉina pordo ĉe la landlimo

90 kilometrojn okcidente de la fama urbo Jining de Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, estas Horgos, la plej okcidenta komerca urbeto kun areo de malpli ol 4 kvadrataj kilometroj ĉe la landlimo de Ĉinio. La urbeto plaĉas per verdaĵoj, kvieteco kaj pureco.

Ambaŭflanke de la stratoj ombras altaj ploj. Sur la stratoj troviĝas standoj de akvome-lonoj kaj dolĉaj melonoj, ĉiovendejo, poŝtoficejo kaj aliaj. Ekster la urbeto sur la vastaj kampoj tie kaj tie paŝtiĝas ŝaf- kaj bov-gregoj. En la brila sunlumo la loko spiras pacon kaj kvietecon.

En la kvindekaj jaroj Horgos sufiĉe floris, tiam ĉinaj kaj sovetiaj komercistoj ofte kontaktiĝis. En 1970 la komerco inter Ĉinio kaj Sovetio

tra tiu ĉi pasejo ŝtopiĝis kaj sekve la urbeto malprosperiĝis. En la fino de 1983 ĝi kaj alia komerc-urbo Tuergat kun Sovetio en Ŝinĝjang denove malfermiĝis kaj revigliĝis. Nun ĉiutage venas ĉi tien maksimume 30 sovetiaj ŝarĝaŭtoj. Iom post iom multiĝis ankaŭ sovetianoj venantaj tien por viziti siajn parencojn.

La urbocentro troviĝas ĉe T-forma vojforko, kie estas kontrolo punkto. Transirinte la landlimon de ambaŭ landoj, sovetiaj kamionoj haltas tie por akcepti landliman-doganan kontrolon kaj kvarantenigon, kaj poste veturas al staplejo de la Ĉina Eksterkomerca Transporta Kompanio (Horgosa Branĉo). Ili alportas ŝtalon, cementon, ĥemiajn sterkojn, personaŭtojn k.a. Elŝarĝinte, ili plenigas la kamionojn per ĉinaj kotonaj ŝtofoj, sveteroj, lupolo kaj aliaj varoj. La sovetiaj kamionoj eniras tien je la deka atm. kaj forveturas posttagmeze de la sama tago. Ili ne tranoktas en la ĉina teritorio. Post tagmanĝo sovetiaj ŝoforoj vizitas vendejojn por aĉeti bezonaĵojn. Mi vidis ke iu ŝoforo aĉetis ledan jakon. Paginte, li diris: "Dankon!" la vendistino ankaŭ diris ruse: "Ne dankinde!" Vendistino, nomata Ĝang Janping, diris al mi, ke la butikoj estas fondita de ŝi kaj ŝia frato, helpate de ŝiaj gepatroj. Ili vendas ĉiutage bezonatajn objektojn, vestojn, cigaredojn, vinojn kaj aliajn. Sovetiaj ŝoforoj ofte vizitas tiun butikon. Al ili plaĉas ledaj jakoj, elektraĵ bukliroj, termosoj kaj fontoplumoj.

Kelkcent metrojn okcidente de la vojforko fluas landlima rivero Horgos, super kiu kuŝas cementa ponto 16 metrojn longa kaj 8 metrojn larĝa. Ĝia mezpunkto estas landlima punkto inter Ĉinio kaj Sovetio. Starante sur ĝia orienta parto oni klare vidas la pordon de Sovetio kun nacia em-

Sovetia kamiono enirinta en Ĉinion



blemo kaj CCCP (USSR) sube. Mil metrojn pli okcidente nebulas vidiĝas ombrata vilaĝo el blankaj domoj. Jen kaj jen venas de tie motor-bruo kaj hunda bojado. Apud la vilaĝo staras gvatturo. Sur montetoj pikildratoj zigzagas laŭlonge de la landlimo. Sovetia soldato kun pafilo staras antaŭ la sovetia landpordo.

La landlima ponto estas ankaŭ nomata Renkontiĝa Ponto. Oni faras renkontiĝon tiam, kiam okazas transiro de homoj aŭ brutoj trans la landlimon, incendio de stepo aŭ arbaro kaj aliaj aferoj atentigindaj al la najbaro. Por ĝustatempe solvi landliman konflikton kaj inviti najbarlandajn reprezentantojn al sia festado ili ankaŭ devas renkontiĝi. Se oni volas renkontiĝi kun la alia, ili hisas ruĝan flagon antaŭ sia gvatturo proksime de la pontoekstremo. Kiam la alia flanko konsentas, ĝi hisas ankaŭ la sian. Post tio reprezentantoj kaj interpretistoj de ambaŭ landoj tuj veturas aŭtomobile al la mezpunkto de la ponto. Renkontiĝante, ili salutas kaj manpremas unu la alian kaj poste komencas diskuti pri koncernaj aferoj. Renkontiĝo ĝenerale daŭras ne pli ol duonhoron.


Se okazas landlima konflikto, konstruado de komunaj landlimaj instalaĵoj aŭ aliaj gravaj afe-

roj, ili do aranĝas intertraktadon en renkontiĝa domo. Respondeculo de la ĉina renkontiĝa domo diris al mi, ke nun intervidiĝoj de ambaŭ flankoj okazas pli ol du cent fojojn jare, tamen intertraktadoj nur dekelkajn fojojn, kiuj okazas en intertrakta ĉambro de tiu flanko, kiu ĝin postulas.

La ĉina kunvenejo situas proksime de la T-forma vojforko. Ĝi estas vilaa domo konsistanta el akceptejo, intertraktejo, manĝoĉambro kaj du ripozejoj. La ĉambroj estas lukse ornamitaj: sur muroj pendas ĉinaj metiartaĵoj kaj la plankoj estas tapiŝitaj. En la intertraktejo staras longa tablo kun ĉina kaj sovetia flagoj. Oni diris al mi, ke post intertraktado la reprezentantoj de ambaŭ landoj kune tagmanĝas. Gastoj, invititaj al la festa aktivado de sia najbara lando, donacas al gastigantoj cigaredujojn, fontoplumojn, cigaredojn, vinon, bombonojn aŭ aliajn. Ankaŭ la gastigantoj donacas ion kiel rekompenco.

Horgos ĉiujare en-kaj elportas 50 000 tunojn da varoj, kio estas kompreneble bagatela por la grandaj landoj Ĉinio kaj Sovetio. Tamen mi rimarkis, ke oni konstruas vendejojn, hotelon, bankon kaj aliajn domojn. Tio montras, ke la tradicia amikeco kaj negoco inter Ĉinio kaj Sovetio disvolviĝas per pli grandaj paŝoj.

LOKOJ MENCIIITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Pekino
2. Baji-urbeto

3. Tjanĝin
4. Horgos

5. Malgranda Sing'an-montaro
6. Ĉangbaj-montaro
7. Dongting-lago
8. Jangzi-rivero
9. Ĉjantang-rivero
10. Ĉinghaj
11. Tibeto
12. Ŝjamen
13. Ĉingdaŭ
14. Jantaj
15. Uhan
16. Hunan
17. Ŝenŝji
18. Hubej
19. Ĝeĝjang
20. Ĝjangŝji
21. Ĉangŝa
22. Pojang-lago

**REFOJA VIZITO DE
RESPONDECULOJ DE UEA
AL PEKINO**

Antaŭtagmeze de la 12-a de februaro, Hŭang Hŭa, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Ĉina Popola Kongreso, intervidiĝis en la Popola Halo de Pekino kun s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de UEA, kaj s-ro Simo Milojeviĉ, ĝenerala direktoro de UEA, kaj diskutis kun ili pri la 71-a Universala Kongreso de Esperanto okazonta en Pekino en 1986.


Tio estas ilia dua vizito, kiu okazis de la 4-a ĝis la 13-a de februaro. Ili havis konsiliĝon kun la Ĝenerala Administracio de la Civila Aviado de Ĉinio (CAAC), la Ĉina Internacia Turisma Servo, Loka Kongresa Komitato kaj aliaj instancoj pri diversaj aranĝoj de la 71-a UK.

Dum ilia restado en Pekino, ankaŭ Baj Ĝjefu, konsilanto de la Pekina Popola Registaro, intervidiĝis kun ili.

Laŭ ĝisdata informo, al la 71-a UK jam anoncis sin aliĝi pli ol 500 esperantistoj el pli ol 30 landoj kaj regionoj. Ke troviĝas tiel multnombraj aliĝontoj jam unu kaj duonan jarojn antaŭ la Kongreso, tio estas malofta en la historio de Universala Kongresoj kaj vere kuraĝiga.

**LA ŜINĜJANG-A ESPERANTO-
ASOCIO FONDITA**

De la 23-a ĝis la 26-a de decembro 1984 en la urbo Urumĉi okazis inaŭgura kunveno de la Esperanta Asocio de la Ŝinĝjang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono, kiun ĉeestis pli ol 70 diversnaciecaj reprezentantoj de la regiono. Ĝin ĉeestis kaj faris paroladon ankaŭ Fu Ven, membro de la konstanta komitato de la regiona komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, Feng Daĝen, estro de la propaganda departemento de la re-



S-ro Hŭang Hŭa (la kvina de dekstre), s-ro Yosimi Umeda (la sesa de dekstre) kaj s-ro Simo Milojevic (la kvara de dekstre)

giona komitato de KPĈ, respondeculoj de la regiona filozofia kaj sociologia federacio kaj Ĝang Julin, membro de "Amikoj de Esperanto". Ŭang Enmaŭ, la unua sekretario de la regiona komitato de KPĈ telefone gratulis la inaŭguron.

La kunveno diskutis pri la statuto kaj labora plano de la asocio kaj ilin aprobis, kaj elektis ĝian unuan estraron. Ĝi invitis Iminov kiel honoran prezidanton de la asocio; Fu Ven kaj Ĝang Julin kiel konsilantojn kaj elektis Ĝang Jang prezidanto, Gaŭ Lin,

Ĝang Ĝong,, Cuj Ŝumin kaj Ahe Majti vicprezidantoj, Ĝang Ĝong kiel ĝeneralan sekretarion, Gaŭ Jŭanfa, Gaŭ Ĉjan kaj Li Djanmin kiel ĝeneralajn vicsekretariojn.

**ESPERANTA SIMPOZIO DE
LA ĈENGDU-A ESP-ASOCIO**

En la dua tagdeko de decembro 1984, la Ĉengdu-a Esperanto-Asocio okazigis Esperantan simpozion, kiun ĉeestis pli ol 80 personoj.

Profesoro Lu Ĝjanbo prezentis al ĝi sian disertajon kun titolo



Feng Daĝen parolas en la kunveno.

“Esperantaj vortradikoj kaj ĝia internacieco (internacieca Esperanto)”, Ĝoŭ Jagŭang de la Fremd-lingva Fakultato de la Siĉŭana Universitato voĉlegis sian disertaĵon kun titolo “Ĉu Esperanto havas transforma-generivan gramatikon?” La artikolo traktis jenajn du problemojn laŭ transforma-generiva gramatiko: 1) Laŭ la perspektivo, la transforma-generiva gramatiko akcelas certigon de la pozicio de Esperanto en lingvistika esplorado kaj esploras latentajn faktorojn akceli Esperanton transiĝi al natura lingvo; 2) Nuntempe ĝi povas pli profunde konigi la sciencecon kaj precizecon de Esperanto. Ankaŭ profesoro Liŭ Hongkang faris sciencajn raportojn pri rilatoj inter traduko kaj interpreto kaj inter lernado de handlingvo-Esperanta traduko kaj altigo de Esperanta konversacio.

La ĉeestantoj ĝenerale opiniis, ke la Esperanta simpozio estas starta punkto de la Ĉengdu-a Esperanta movado en ĝia progreso surbaze de popularigo.

ESPERANTO-KURSO EN GERMANA ĴURNALO

Por la unua fojo post multaj jaroj, granda germana ĵurnalo Augsburgener Allgemeine (Aŭgsburga

La Esperanto-Asocio de Brasilia sukcesis aĉeti sian propran sidejon. Jen estraro de la asocio en la lernoĉambro de la sidejo.



Ĝenerala Gazeto, eldonkvanto ĉ. 300 000) aperigas Esperanto-kurson inter januaro kaj aprilo 1985 laŭ iniciato de Stefan Maul, redaktoro de la ĵurnalo kaj ĉefredaktoro de MONATO, internacia magazino sendependa, por la 70-a UK, kiu okazos en somero en Aŭgsburgo. La kurso ampleksis ne nur Aŭgsburgon, sed ankaŭ la sudokcidentan parton de Bavario inter la rivero Danubo kaj la Alpoj.

INTERLINGVISTIKA MEMOR-KALENDARO

Lige kun la redaktaj laboroj de ENCIKLOPEDIO DE ESPE-

RANTO nun pretiĝas, por eldono en 1987, interlingvistika memorkalendaro. Ĝi enhavas du partojn: 1) alfabete laŭnoman, kun la jaro de naskiĝo kaj morto; 2) kronologian kun precizaj indikoj pri datoj de naskiĝo kaj morto kaj la respektivaj lokoj kun aldono de la hodiaŭa ŝtato.

La verko entenoŝ ne nur datojn de la Esperanto-movado, sed de la plan-lingva movado ĝenerale. Por igi ĝin maksimume kompleta kaj preciza, la redaktoro petas la helpon de ĉiuj esperantistoj per alsendo de indikoj laŭ la jenaj modeloj:

- 1) GRABOWSKI, Antoni (1857-1921)
- 2)* 1885-03-13 Paul BENNEMANN, Leipzig (DDR)
- 1905-08-09 Akcepto de la Deklaracio pri Esperantismo, Boulongne-sur-Mer(F)
- * 1935-01-08 Louis de BEAUFONT (t.e. Louis CHEVREUX), Thezy-Glimont(F)

Viajn indikojn direktu al la eldonisto: Artur E. Iltis, Schulstr. 30, D-6601 SCHEIDT, FR Germanio.

Ekspozicio de ĉinaj eldonaĵoj en Jugoslavio





58a SAT KONGRESO
DE ESPERANTO
amersfoort 27-7-3-8-1985



Emblemoj de la 58-a SAT-
Kongreso de Esperanto

EKSPOZICIO DE ĈINAJ LIBROJ EN JUGOSLAVIO

La ekspozicio aranĝita de s-ano Kocian Aleksandar, peranto de El Popola Ĉinio, kun helpo de Mirta Godec kaj Cvetanka Tubiĉ okazis de 14-a ĝis 21-a de novembro 1984 en la urba kaj universitata librejo en Osijek. En ĝi estis eksponitaj ĉiuj E-eldonaĵoj el Ĉinio. Gelerantoj de elementa lernejo el Valpovo sub la gvido de ilia instruistino Julija Rusiĉ vizitis la ekspozicion.

LA 58-A KONGRESO DE SAT

La kongreso okazos de la 27-a de julio ĝis la 3-a de aŭgusto 1985 en Amersfoort, Nederlando. Samtempe okazos ankaŭ la kongressemajno por la infanoj kaj ekspozicio de infandeseĝoj. La organizanto esperas ricevi belajn desegnaĵojn el la tuta mondo kaj ke la gepatroj aliĝu kun siaj infanoj al la 58-a S.A.T.-kongreso.

Por peti informojn skribu al la sekretario de O.K.K., Kdino A. Noordewier, Kon. Emmalaan 7, AH-3832, Leusden, Nederlando.

SUR NIA LIBROBRETO

LEGU KAJ LERTIĜU

En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitajn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj metiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

LA RED.

Lerni lingvon signifas klopodi por akiri kapablon paroli, legi, skribi kaj traduki. Tamen por lerni Esperanton legado okupas aparte gravan lokon pro manko de sufiĉe multaj okazoj por buŝe uzadi la lingvon. Do taŭgaj legolibroj estas tre gravaj por la instruado de Esperanto. Estas ĝojinde, ke pli kaj pli multaj legolibroj estas eldonitaj. Jen ĉi tie mi prezentas al vi du novajn en unu fojo:

Faktoj kaj Fantazioj verkita de drino Majorie Boulton, eldonita de UEA. Formato: 21 × 14 cm. 431 p. Prezo: 36 gld. plus sendokosto.

Tiu ĉi estas legolibro rara en sia speco. Anstataŭ uzi elektitajn anekdotojn, legendojn, humuraĵojn, novelojn, eseojn kaj poemojn, drino M. Boulton mem verkis por ĝi dekojn da mallongaj legaĵoj pri geografio, historio, zoologio, kutimoj, moroj, korespondado, lingvo, gramatiko kaj kuriozaĵoj kaj reverkis pli ol 30 fabelojn. Por krei sian libron, ŝi traserĉis ses grandajn

bibliotekojn, foliumis centojn da libroj kaj gazetoj en kvar lingvoj kaj elfosis verkojn eĉ el forgesitaj antropologiaj fakgazetoj. Ĝi estas legolibro vere originala.

La fabeloj en la libro okupas rimarkinde pli altan lokon. Ili apartenas al malgrandaj popoloj de Albanio, Aŭstralio, Birmo, Etiopio, Ganao, Irlando, Maroko, Nepalo, Rumanio kaj Turkio k.a. La plejparto de ili estas interesaj kaj instruaj. La ganaa fabelo "Kiu vere amis ŝin?" rakontas pri saĝa provo farita de patro al sinsvatantoj pri ilia amo; la eskima fabelo "La virino kiu adoptis ursidon kiel filon" prezentas mirindan amikecon inter homo kaj besto; la turka fabelo "Hodja kiel simpla urbano" akre mokas avarulon; la kamboĝa fabelo "Ili volis sekigi la maron" laŭdas bonulon kaj kondamnas malbonulon; la vaska fabelo "Ezaro kaj Lanjoo sur la monto Akelaro" prikantas bravecon kaj fratecon; la samoa fabelo "Kiel porkoj venis al samoo" rakontas, kiel virino naskis porkon; la nov-hebrida fabelo "La edzino de la suno" rakontas pri amo inter homo kaj feino; la rumana fabelo "La abelo kaj la araneo" instruas pri amo al la patrino; la zanzibara fabelo "Leono, hieno kaj kuniklo" instruas, ke saĝo povas venki forton; la kuba fabelo "Lango" montras la bonon kaj malbonon de unu same afero. Mi kredas, ke multaj legantoj interesiĝos pri la fabeloj ĝuste pro tio, ke ili estas floroj de kulturo de malgrandaj nacioj. Se



Esperanto celas interkomprenon kaj amikecon inter la popoloj tra la mondo, ĉu ne estas tute prave, ke la esperantistaro donu apartan atenton al la literaturo kaj kulturo de la malgrandaj popoloj? La mondfamaj verkoj de la grandaj lingvoj ja ne tiel multe bezonas la helpon de internacia lingvo.

Por plivastigi la vortostokon de la legantoj, la verkinto zorgis, ke la legaĵoj kovru vastan terenon, kaj donis klarigojn necesajn por helpi la lernadon. La materialo estas aranĝita en 52 partoj, ke la lernanto povas fini ĉiusemajne po unu parton kaj trastudi la tutan libron en unu jaro.

La lingvo de la verko estas modela kaj klara kiel kristalo. Mi rimarkis nur tre malmultajn dubindaĵojn kiel ekz.: p.115 "tuthoma familio" (tuthomara familio?); p. 261 "hundoj kaj katoj malamas unu la alian" (hundoj kaj katoj malamas unuj la aliajn?); p. 264 "kaptis la birdon en la buŝo" (per la buŝo?); p. 350 "tienkuo" (tienkou aŭ tjangoŭ?) kaj p. 343 "iel li ne povis pli alten" (ial li ne povis pli alten?).

Amuza Legolibro en Esperanto verkita de Albert Lienhardt, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. Formato: 13.7 × 19.5 cm. 216 p. Prezo: 16.5 gld. plus sendokosto.

Tiu ĉi legolibro kun 1 000 humuraĵoj kiel la ĉefa parto estas multe pli facila por lernantoj post la fino de elementa kurso. Por helpi la lernantojn, oni aldonis al la humuraĵoj 2 000 didaktikajn demandojn kaj respondojn pri ili kaj la elementoj en la kunmetitaj kaj derivitaj vortoj estas dividitaj per lig-streketoj. Kaj krome, la akcentindaj vortoj en la frazoj estas kursive presitaj tiel, ke la legantoj povas bone plenumi la laŭtleĝadon, kio estas bona ekzerco por akiri konversacian kapablon. Laŭ la verkinto, la flankelementoj de la kunmetaĵoj devas esti elparolataj kun pli forta akcento. Do *poŝtuko* kaj *naztuko* ricevas la plej fortan akcenton sur la silaboj *poŝ-* kaj *naz-* anstataŭ sur *tu-*. Ĉu tio ne estas kontraŭ la fundamento? Kelkaj gramatikistoj diras, ke en kunmetaĵoj la flankelementoj povas konservi sian akcenton, se ĝi ne kolizias kun tiu de la ĉefelemento, tamen tia akcento estas duagrada. La 11-a regulo de la Plena Gramatiko de Esperanto donita de d-ro Zamenhof ja diras "Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino)". Do diskutinda estas tiu opinio de la verkinto. Kaj korektendaj estas jenaj eraroj en la teksto: p. 119 "Henriko... legis *en libro*" (devus esti legata "Henriko... legis libron"); p. 131 "Kiam li hejmen-

venis, *ĵus* (anstataŭ tuj) antaŭ la vespera manĝo, lia patrino estis tre malkontenta"; p. 195 "Li jam ofte *trenis* (anstataŭ trejniĝis) kiel avanulo; sed malgraŭ tio li ankoraŭ ne estas tre lerta ludanto"; p. 199 "*june* (legu: juna) urbano"; p. 215 "kiu defendas la *intereso* (legu: interesojn)". Estas rimarkinde, ke la legolibro estas ilustrita per multaj amuzaj desegnaĵoj.

Recenzis Laŭlum

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

Fenikso tro Ofta unuakta komedio en versoj, kiu famigis sian aŭtoron Christopher Fry. Esperantigita de William Auld. Eldonita de Fonto. Formato: 21 × 14 cm. 79 p. Prezo ne montrita.

Akvon Mi Petas! kolekto de dek du dokumentoj skribitaj de bombitoj en Hirosima kaj Nagasaki. Tradukita kaj eldonita de la Hukuoka Esperanto-Societo. Formato: 14.7 × 21 cm. 64 p. Prezo ne montrita.

Elprovado de l'Amo poemaro de Antun Šimunic. Eldonita de Esperanto-Societo "Liberiga Stelo". Formato: 14.5 × 21.5 cm. 18 p. Prezo ne montrita.

Esperanto-English Vocabulary kompilita kaj eldonita de Biswanath Pal. Formato: 21.5 × 17.6 cm. 52 p. Prezo ne montrita.

La Mirinda Libro eldonita omaĝe al Ramon Molera fare de la Barcelona Esperanto-Centro. Formato: 14.7 × 21 cm. 66 p. Prezo: 2.00.

Norvegujo bela broŝuro simila al la pli frua "Rigardu al Norvegujo", iom pli ampleksa kun 16 paĝoj da teksto kaj 8 paĝoj de koloraj bildoj. Eldonita de la Reĝa Norvega Ministerio de Eksteraj Aferoj. Formato: 21 × 30 cm. Senpage ricevebla por ĉiuj petantoj al la Norvega Esperantista Ligo (Olaf Schousv. 18, 0572 Oslo 5, Norvegujo).

VIVO DE MALJUNULOJ

Fotoj de SUN JI




En sport-kunveno de maljunuloj

En tetrinkejo

Prizorgata de siaj filino kaj nepino






Senlaca lernado




Kampanino kun siaj genepoj



Konsultigo pri leĝo



Rigardo de strata spektaklo



RARAJ ELTERIGITAJ ANTIĤVAĴOJ

de LI ĜIŬFANG kaj BAŬ JONG Fotoj de HU ĈUJ

ANTAŬ nelonge la pekina Muzeo de Imperiestra Palaco aranĝis grandan Tutlandan Ekspozicion de Raraj Elterigitaj Antikvaĵoj. La ekspozicio spegulis la gravajn sukcesojn de ĉina arkeologia afero de post 1976. Multaj el la 820 pecoj da antikvaĵoj rekomenditaj de diversaj lokoj de Ĉinio estas senescepte raraj trezoroj unikaj en la mondo. La ekspoziciaĵoj inkluzivas bronzaĵojn, ceramikaĵojn, jadaĵojn, skulptaĵojn, surlignotabulajn kolorajn

penetraĵojn kaj aliajn metiartaĵojn, faritajn en la longaj historiaj tempoj de la lasta periodo de la primitiva socio ĝis 1911 p.K.

LUKSAJ BRONZAĴOJ

En Ŝang-dinastio (ĉ. 16-11 j.c. a.K.) antaŭ pli ol 3 000 jaroj, Ĉinio jam estis en sklava socio. Tiam parto de sklavoj okupiĝis pri metioj kaj povis fandi bronzaĵojn el proporciigitaj kupro kaj stano. Ili povis fandi armilojn, kuirilojn, manĝilojn, vinujojn,

akvujojn, muzikilojn kaj ornamaĵojn por ĉaro kaj jungilaro. La produktaĵoj en diversaj formoj surhavas belajn desegnojn kaj epigrafojn, kiuj estas gravaj materialoj por esplori la antikvajn sociojn de Ĉinio.

Grandan parton de la ekspoziciaĵoj konsistigis bronzaĵoj. La bronza apro-forma vinujo de Ŝang-dinastio elterigita en Hunan-provinco en 1980 estas vera majstraĵo. La grasa apro kun levitaj kapo kaj oreloj kaj du akraj

Jadaĵo cong




dentegoj elstarantaj ĉe la buŝanguloj rigardas antaŭen. . . Ĉio ĉi vivece montris la sovaĝecon de apro. Sur ĝia dorso estas ovala aperturo, sur kiu estas kovrilo kun tenilo en formo de kuŝanta birdo. Tia granda bestoforma bronzaĵo estas tre rara en Ŝang-dinastio, tamen ĝi markis la teknikan nivelon de tiu tempo.

Alia valorega objekto estas "plado de Ĉjang", trovita en Ŝenŝji-provinco, 1976. Ĝi estas ronda kun oreloj kaj ringa piedo. Sur la ekstera surfaco estas desegno de birdo kun alta kresto kaj longa vostoplumaro. Plej valore estas, ke sur la fundo de la plado estas oracio el 284 ideogramoj laŭdanta la historiajn meritojn de la pasintaj reĝoj de la antaŭa periodo (ĉ. 11-10 j.c. a.K.) de Ĝoŭ-dinastio en la fondo de la dinastio kaj ankaŭ registris la familian historion de "Ĉjang", la posedanto de la plado. La oracio havas altan valoron en esplorado de la Okcidenta Ĝoŭ-dinastio.

En 1983 oni elterigis en Hubej ore damaskenitan bronzan lancon uzitan de Fuĉaj, reĝo de U-regno (495-473 a.K. en regado). La mallume verda lanco, ambaŭflanke iom konvekso, havas du akrajn klingojn kaj estis oblikve kradita per duoblaj linioj. Sur unu flanko estas ore damaskenitaj ideogramoj, kiuj pruvis, ke la lanco estis uzata de Fuĉaj mem. Li estis reĝo de U-regno fine de la periodo Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.). Li venkis la regnojn Ĉu kaj Jŭe sinsekve.

En 1982 oni elterigis en Ĝeĝjang-provinco bronzan muzikludon domon de la periodo Militantaj Regnoj (475-221 a.K.). La domo reaperigis la arkitekturon kaj kulturan vivon antaŭ pli ol 2 000 jaroj. En la domo, kun aĵuraj muroj en tri flankoj, senmura fronto kaj po fosto ambaŭ-



Bronza porko-forma vinujo

flanke, sidas 6 homoj, el kiuj 2 ludas kordmuzikilojn, 1 frapas tamburon, 1 ludas *ju* (ĉina bambua muzikilo) kaj la aliaj du sidas surgenue ŝajne kantantaj. Sur la tegmento staras ok-angula fosto, sur kies supro kuŝas birdo ene kun truo. Tio montris, ke la bronza domo servis kiel subportilo.

Ankaŭ bronza bovo-forma lanterno estas rara majstraĵo. La bovo tute damaskenita subportas lanternon surdorse. Sur ĝi estas movebla klapo, kiu povas ŝanĝi la direkton de la lum-fasko kaj ŝirmi fajron kontraŭ vento. La lanternon oni trovis en la tombo de la reĝo Ĝŭangling de la Orienta Han-dinastio (25-220 p.K.). Rara trezoro estas ankaŭ la bronza rektangula spegulo de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p. K.) elterigita en Linzi de Ŝandong-provinco. La spegulo longas 115.1 cm., larĝas 57.7 cm. kaj pezas 56.5 kg. Ĝi estas la plej granda el la speguloj de Han-dinastio.

DELIKATAJ CERAMIKAĴOJ

En la lastaj jaroj ĉinaj arkeologoj trovis plurajn ruinojn de la kulturo de primitiva socio. Hemu-

du-kulturo antaŭ pli ol 7 000 jaroj en Ĝeĝjang-provinco estas unu el la fruaj kulturoj ĉe la neolitiko ĉe la meza kaj malsupra basenoj de Jangzi-rivero. La kulturo de Hemudu estas tute malsama al Jangŝaŭ-kulturo ĉe la meza baseno de la Flava Rivero. Ĝi pruvis, ke la ĉina nacio kreis brilan primitivan kulturon ne nur en la baseno de la Flava Rivero, sed ankaŭ en tiu de Jangzi-rivero. La eksponita nigra fajenca poto kun ovala formo estis elterigita en Hemudu. La surfaco estas brila kaj glata. Sur la ekstera surfaco estas gravurita apro kuranta. La lakonaj linioj faksimile bildigis la apron.

La valora fajenca botelo en partikulara formo estas objekto en kategorio de Jangŝaŭ-kulturo antaŭ 4 000-5 000 jaroj. La botelo elterigita en Gansu-provinco havas malgrandan aperturon, profundan ventron kaj platan fundon. La aperturo estas en formo de virina kapo kun vangoj larĝaj, buŝo malfermita kaj okuloj fikse rigardantaj antaŭen. Ŝi sin montras sana, forta kaj diskreta. La ŝultro de la botelo konturiĝas per falanta arka linio, imagigante pri

virino en mantelo staranta kontraŭ vento. La plastiko de la botelo esprimis la estetikajn strebadojn kaj lertecon de tiutempaj homoj en modlado de homa figuro.

La 238 pecoj da porcelanaĵoj de Ĵuan-dinastio (1279-1368 p.K.) elterigitaj en Ĝjangŝi-provinco estas valorega riĉaĵo. La ekspozicio montris 2 bludesegajn florvazojn kaj du bludesegajn potojn kun kovriloj. La ujoj sendifekte konserviĝintaj estas grandaj, kaj la glazuro pura, desegnoj belaj.

BELAJ JADAĴOJ

Jadaĵoj de Ĉinio karakteriziĝas per longa historio kaj partikulara arta stilo. La eksponita jadaĵo *cong* markis la teknikan nivelon de la jadaĵoj de la neolitika Ljangĝu-kulturo antaŭ pli ol 4 500 jaroj. *Cong* estas nomo de speco de jadaĵo ĝenerale kubforma kun cilindra truo ene. La eksponita *cong* havas multajn dentojn sur la edroj, kiuj dividis la jadaĵon

en kelkajn partojn, sur ĉiu el ili estas reliefaj okuloj, nazo kaj faŭko formintaj bestan vizaĝon. Transversaj kaj vertikalaj kanalitaj strioj kaj arkaj linioj fajne formis la brovojn kaj okulojn. *Cong* estas jadaĵo ofte entombigita kune kun mortintoj. La farado de jadaĵoj plej prosperis en la periodo Militantaj Regnoj ĝis Han-dinastio (inkluzive). La drakoforma vesto-ornaĵo farita en la periodo Militantaj Regnoj montris altan teknikon de farado de jadaĵoj de tiu tempo. La konturnaj linioj de la jadaĵo pensigas pri fortenco. En 1983 oni trovis grandan kvanton da jadaĵoj en la tombo de la reĝo de Nanĵue-regno. La eksponita jada pokalo korno-forma ja estas unu el la jadaĵoj el la tombo. La bonkvalitan pokalon en bela formo vidu en la deka numero de EPĈ, 1984.

ABUNDAJ ARTAĴOJ


Oni trovis grandan kvanton da silkaĵoj en tomboj de la periodo

Militantaj Regnoj, en Ĝjangling de Hubej-provinco. En la ekspozicio oni povas vidi brokatojn kun dancantoj kaj bestoj, kun geometriaj desegnoj, kaj robon kun broditaj drakoj kaj feniksoj. La lana litkovrilo trovita en Lŭo-pu-gubernio de Ŝinĝjang raras pro siaj belegaj desegnoj, freŝaj koloroj kaj kompleta sendifekteco. En la pagodo Ĵujĝuang de Suĝoŭ de Ĝjangsu-provinco, konstruita en la Norda Song-dinastio (960-1127 p.K.), oni trovis delikatan steleon unikan en la mondo. La steleo altas 122.6 cm., kun skeleto el santalo. Sube estas okangula bazamento ornamita per lakaj kaj oraj desegnoj. Meze estas or-fadena drako kun naŭ levitaj kapoj. Supre de la mezo estas ok orumitaj latunaj kolonetoj, inter kiuj estas ora niĉo kun ora budho ene. Sur la pinto de la steleo estas granda kristala globo ornamita per arĝentaj dratetoj briletantaj. La majstraĵo estas multe admirata de rigardantoj.

Fajenca botelo



Bludesegna vazo





Bronza bovo-forma lanterno

81511
碧星燦爛照耀

寰宇

《中國報道》創刊
三十五周年紀念

費秋林書賀



"Verda stelo brilanta prilumas la tutan mondon", vortoj skribitaj de fama ĉina kalligrafo Fej Ŝin'uo por la 35-a datreveno de la fondiĝo de "El Popola Ĉinio"